

Enhavo

1	Sciencaj aranĝoj dum la 95-a Universala Kongreso en Bjalistoko...	2
1.1	IKU: la 62-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato	2
1.2	Esperantologia konferenco pri ideoj kaj idealoj de <i>Zamenhof</i>	2
1.3	Simpozio omaĝe al <i>István Szerdahelyi</i>	3
2	Aliaj aranĝoj	3
2.1	La 18-a konferenco de Interlingua	3
2.2	Pri „Apliko de Esperanto en profesia agado“ en Karlovo	4
2.3	Fakuloj en fakaj aranĝoj (<i>Goes, Jansen, Gobbo, Fössmeier</i>).....	4
2.4	ESF-direktoroj en lingvistika konferenco (<i>Tonkin, Goodall, Reagan, Fonseca-Greber</i>).....	5
3	El universitatoj	7
3.1	Habilitiĝo de <i>Iлона Koutny</i> pri parolsintezo	7
3.2	Doktoriĝo de <i>Oksana Burkina</i> pri fonologio de Esperanto.....	16
3.3	Doktoriĝo de <i>Andreas Kück</i> pri kvantaj studoj lige al Esperanto.....	20
3.4	Magistraj kaj diplomaj disertacioj	22
3.4.1	<i>Benedikt Poller</i> pri la kultura fono de Esperanto	22
3.4.2	<i>Alberto Emerson Werneck Dias</i> pri neologismoj	22
3.4.3	<i>Danijela Drakula</i> pri sociologiaj aspektoj de la Esperanto-komunumo.....	22
3.5	Bakalaŭraj disertacioj.....	23
3.5.1	<i>Katarína Noskova</i> kontraste pri valento	23
3.5.2	<i>Marek Blahuš</i> pri ortografia kontrolo de Esperanto.....	23
3.6	Diplomlaboraĵoj el Poznano (<i>Bavant, Brosch, Vogt</i>).....	24
3.7	Fino de la Esperanto-fako en la ELTE-Universitato Budapeŝt	24
3.8	Amsterdamo: <i>Wim Jansen</i> oficiale nomumita profesoro.....	25
3.9	Amsterdamo: Eksperimenta lingvistika kurso.....	25
4	<i>Dalibor Brozović</i> (1927-2009).....	25
4.1	Omaĝo (<i>Nikola Rašić</i>)	25
4.2.	La festlibra artikolaro.....	27
5	<i>Tanaka Katsuhiko</i> – 75-jara	29
6	<i>Toon Witkam</i> – 65-jara. Persona bibliografio	30
7	Libro omaĝe al <i>István Szerdahelyi</i>.....	34

1 Sciencaj aranĝoj dum la 95-a Universala Kongreso de Esperanto

Kiel kutime ankaŭ dum la 95-a Universala Kongreso de Esperanto, de 25.7. – 1.8.2009 en Bjalistoko/Pollando, oni okazigis kelkajn sciencajn aranĝojn, kiuj meritas la atenton de interlingvistoj kaj esperantologoj.

1.1 IKU: la 62-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato

Kadre de la 62-a sesio, kies rektoro estis prof. d-ro Witold Stepniewski (Politekniko de Lublino), oni prezentis jenajn prelegojn:

<i>Amri Wandel</i>	Teleskopoj – de Galileo ĝis la Spac-teleskopo
<i>Nicolaŭ Dols Salas</i>	Perspektivoj en fonologia kaj fonetika esplorado de Esperanto
<i>Tsvi Sadan</i>	Socilingvistika komparo de du diasporaj lingvoj, la jida kaj Esperanto, en Interreto
<i>Tomasz Chmielik</i>	La kvin urboj de la fratoj Goskind
<i>Mark Fettes</i>	Ĉu eblas kultivi imagipovon?
<i>Árpád Máthé</i>	L.L. Zamenhof kiel redaktoro k.a. redaktoroj en la pasintaj 120 jaroj
<i>Otto Prytz</i>	La invento de la jubileulo Louis Braille – daŭrigebla kaj daŭriginda
<i>Maŭro La Torre</i>	Nombrado: ilara, vorta, cifera
<i>Barbara Despiney</i>	Pol-litova Unio: respubliko de multaj nacioj

La prelegoj aperis:

Vergara, José Antonio (2009): IKU 62. Internacia Kongresa Universitato. 62-a sesio. Bjalistoko, Pollando, 25 julio – 1 aŭgusto 2009. Rotterdam: UEA, 140 p.

1.2 Esperantologia konferenco pri ideoj kaj idealoj de Zamenhof

La tradicia esperantologia konferenco traktis jenan ĉeftemon

“La ideoj kaj idealoj de Zamenhof kaj ilia kultura kaj religia fono“.

La konferencon gvidis *prof. d-ro Christer Kiselman* el Upsalo/Svedio, membro de la Reĝa Sveda Akademio de Sciencoj, membro de la Akademio de Esperanto;.

Kadre de la konferenco oni prezentis jenajn prelegojn:

<i>Louis C. Zaleski-Zamenhof</i>	Salutmesaĝo enkonduka
<i>Tsvi Sadan (Tsuguya Sasaki)</i>	Juda fono de Zamenhof kaj Esperanto
<i>Vytautas Šilas</i>	Zamenhof kaj Litovio. Nia judo
<i>Zbiginiew Romaniuk</i>	prezentis sian novan libron verkitan kune kun Tomasz Wiśniewski kaj tradukitan esperanten de Przemysław Wierzbowski, „Ĉio komenciĝis ĉe la Verda“. Interpretis Jarosław Parzyszek.
<i>Christer Kiselman</i>	Hilelismo kaj homaranismo. La religiaj kaj filozofiaj ideoj de Zamenhof
<i>Aleksander Korĵenkov</i>	Aktualaj problemoj de zamenhofologio
<i>Humphrey Tonkin</i>	Konkludo

1.3 Simpozio omaĝe al *István Szerdahelyi*

Dum la kongreso okazis simpozio dediĉita al prof. István Szerdahelyi. La kadra temo de la aranĝo estis

István Szerdahelyi: verko, vivo kaj heredaĵo. Simpozio okaze de la 85-a datreveno de lia naskiĝo

Kadre de la simpozio (sub la auspicio de AdE kaj CED) omaĝe al prof. István Szerdahelyi (1924-1987) - novema lingvisto, preciza interlingvisto, elstara pedagogo, leksikografo kaj fondinto de la Esperanto-fako de la budapeŝta Universitato Eötvös Loránd¹ – *Ilona Koutny* prezentis la faman fakulon kaj lanĉis la libron *Abunda fonto*², dediĉitan al li. Ŝi estas iama studentino kaj dum jardeko lia posteulo en la Esperanto-fako de la universitato ELTE.

Iamaj gestudentoj kaj kolegoj traktis kelkajn el liaj – daŭre aktualaj - temoj:

Probal Dasgupta analizis la problemojn de morfemoj. *Renato Corsetti* parolis pri la propedeŭtika valoro de Esperanto. *Zsófia Kóródy* prezentis la rolon de Esperanto kadre de instruado de fremdaj lingvoj. *István Ertl* prelegis pri specifaj aspektoj de tradukado el kaj al Esperanto. La specifaĵojn de la esperanta leksikografio skizis *Ilona Koutny*, kiu gvidis la programon.

Bildojn aŭ registraĵojn kun la voĉo de Szerdahelyi serĉas *Ilona Koutny*:

Koutny.ilona@gmail.com

(Laŭ informoj de *Ilona Koutny*)

2 Aliaj aranĝoj

2.1 La 18-a konferenco de Interlingua

Ĉiu planlingva aranĝo estas interesa evento por interlingvistoj, sendepende de tio, kiun planlingvon oni uzas aŭ preferas. La adeptoj de *Interlingua* estas relative aktivaj. Ili okazigas regionajn kaj internaciajn konferencojn. La plej grandaj regionaj estas la skandinaviaj Interlingua-Konferencoj, kiujn ĝenerale partoprenas pli ol 50 personoj.

La ĉi-jara ĉefa internacia aranĝo, la „Conferentia international de Interlingua“, estas laŭvice la 18-a. Ĝi okazis de la 25-a de julio ĝis 1-a de aŭgusto 2009 en la sudgermana urbeto Kirchheimbolanden. Partoprenis ĉ. 40 personoj el 11 landoj, inter ili la vidvino de la franca lingvisto André Martinet (iam lingvistika direktoro de IALA), *Jeanne Martinet*, la konataj interlingvistoj *Věra Barandovská-Frank* (Paderborn/Germanio) kaj *Donald Gasper* (Hongkong/Ĉinio). Krom tio partoprenis *Brian C. Sexton*, aŭtoro de esperantlingva libro pri Interlingua, *Ingvar Stenström*, dojeno de la skandinavia Interlingua-movado kaj la plej sukcesa aŭtoro de lernolibroj por tiu ĉi lingvo, *Antonio Ruiz Castellanos*, profesoro de latino en la Universitato Cádiz. Pri interreta paĝo kaj vikipedio zorgas junaj homoj, i.a. *Alberto Mardegan*, *Martijn Dekker* kaj *Thomas Breinstrup*, la redaktoro de la ĉefa revueto „panorama en interlingua“. Al la programo apartenis kursoj, diskutoj, turismaj kaj kulturaj aranĝoj, surstrata varbado ktp. La konferencanoj interkonsentis pri tio, ke oni devas multe pli disvastigi la scion pri Interlingua, varbi novajn adeptojn, instrui

¹ Pri la sorto de la Fako vidu p. 24-25.

² Pri la libro vidu p. 35-36.

la lingvon, pretigi diversajn lernomaterialojn, utiligi pli forte la eblojn de la elektronikaj komunikiloj, plifortigi la rilatojn al Eŭropa Unio ktp. Por 2010 oni planas kelkajn regionajn aranĝojn. Dum la konferenco oni fondis germanan sektion de UMI (Union Mondial pro Interlingua) kun la nomo „Union German pro Interlingua“ (UGI). La Interlingua-versio de Vikipedio la 29-an de aŭgusto 2009 entenis 4863 artikolojn (<http://ia.wikipedia.org>.) Informojn pri Interlingua, ties eldonaĵoj kaj pri diversaj aktivadoj oni trovas ĉe www.interlingua.com. Pri la historio de la movado por Interlingua ĵus aperis jena libro:

Stenström, Ingvar (2008): Interlingua e su promotion durante 50 annos. Varberg: Societate Svedese pro Interlingua. ISBN 978-91-971940-5-1, 270 p. (Mendebila nur ĉe : Lulu, Print On-Demand, www.lulu.com).

Pri la karaktero de la libro ni legas sur la lasta kovrilpaĝo:

„Iste libro presenta un historia de Union Mondial pro Interlingua (UMI) in le forma de un narration personal, basate sur la recerca e re-lectura de milles de paginas de documentos, letteras e magazines.“

(Laŭ materialoj el „panorama in interlingua“ 22[2009] 4 [julio-aŭgusto], kun korektoj de Věra Barandovská-Frank kaj Donald Gasper).

2.2 Pri „Apliko de Esperanto en la profesia agado“ en Karlovo

Sub la supra ĉeftemo de la 12-a ĝis 15-a de junio 2009 en Karlovo/Bulgario okazis internacia seminario en Esperanto. Al la organizantoj apartenis AIS-Bulgario, Bulgara Esperanto-Asocio, Internacia Universitato–Karlovo (AIS-establo) kaj la regiona estraro de la neesperantista organizo „Scienc-teknika Asocio“. La Seminarion partoprenis reprezentantoj de 11 landoj. La ĉefa organizanto estis *Bojidar Leonov*, Prezidanto de AIS-Bulgario. Oni prezentis i.a. jenajn prelegojn, interesajn por interlingvistoj:

<i>Eva Polakova</i>	Tutmonda globalizado, uzata lingvo kaj etiko de la komunikado en amaskomunikiloj
<i>Nikola Uzunov</i>	Esperanto kiel familia lingvo
<i>Seán Ó Riain</i>	Lastatempaj lingvaj evoluoj en EU (sendita teksto)

2.3 Fakuloj en fakaj aranĝoj (Goes, Jansen, Gobbo, Fössmeier)

La „Association Belge de Africanistes“ (Belga Asocio de Afrikanistoj) okazigis sian jarkonferencon, la 12-an de decembro 2008, en la Universitato de Antverpeno. Al la programo ankaŭ apartenis prelego de la afrikanistino *Heidi Goes* pri „The history of the Esperanto movement in Africa“. (Pri la historio de la Esperanto-movado en Afriko; laŭ la programkajero).

En la kadro de la Conference on Bilingual and Multicultural Education (konferenco pri dulingva kaj multkultura edukado), la 10-an de decembro 2008, en Bruselo, *prof. d-ro Wim Jansen* prelegis pri „Esperanto nobody’s springboard, everybody’s landing-field“ (Esperanto, nenies saltobreto, ĉies surteriĝejo). (Fonto, materialoj de la preleginto).

Kadre de la 1-a konferenco pri Network for Cultural and Linguistic Practices in the International University (CALPIU), de 15.-17. decembro 2008 en la Universitato Roskilde/Danio, *d-roj Federico Gobbo* kaj *Reinhard Fössmeier* prelegis pri „A university mainly in Esperanto“ (fonto: <http://imw.ruc.dk/calpiu/calpiu/conference>, 2.6.09)

2.4 ESF-direktoroj en lingvistika konferenco

ESF-direktoroj de Esperantic Studies Foundation (ESF) *Humphrey Tonkin, Grant Goodall, Timothy Reagan*, kaj *Bonnie Fonseca-Greber* partoprenis en du seminarioj ĉe la Konferenco de la Internacia Societo por Lingvaj Studoj (ISLS) en Orlando/Florido (Usono), kiuj okazis de la 11-a ĝis 13-a de junio 2009.

La temo por **Sesio I** estis interlingvistiko kaj esperantologio. La prezentadoj inkluzivis ne nur superrigardon de interlingvistiko kiel kampo de studo, sed ankaŭ ekzamenadon de la demando, kial Esperanto meritas la gravan atenton de lingvaj esploristoj.

Sesio II ekzamenis nuntempajn demandojn rilate al Esperanto kaj edukado. Ĝi inkluzivis prezentadojn pri Esperanto kaj alilanda lingva edukado en Usono kaj konsideris la ofte diskutatan valoron de Esperanto por plifaciligi la lernadon de aliaj lingvoj.

Por pli da informoj pri la temoj de ĉi tiu gazetara komuniko, bv. kontakti ESF retpoŝte ĉe admin@esperantic.org.

2.4.1 La resumoj de Sesio I: Interlingvistiko kaj Esperantologio

La internacia lingvo Esperanto kiel lingva kaj socia fenomeno

de Humphrey Tonkin

Profesoro pri Humanecaj Studoj, Universitato de Hartfordo

Konversacio en la internacia lingvo Esperanto aspektas kaj sonas esence simila al konversacio en kiu ajn alia lingvo.

Ĝi estas bazita sur pli ol cent jaroj da uzado kaj povus pritrakti kiun ajn temon. Esperanto akordiĝas kun plejparte ĉiuj difinoj de tio, kio konsistigas lingvon. La kreinto de Esperanto, Zamenhof, konsideris la fenomenon lingvo kiel procedon – daŭre ŝanĝiĝantan, kaj apartenantan al specifa komunumo, kaj sekve socia fenomeno. Esperanto-parolantoj frue transprenis respondecon pri Esperanto, transformante ĝin el lingvoprojekto al idiomo de plenrajta parolkomunumo.

Oni ofte argumentas, ke Esperanto estas “ne natura,” sed la termino “natura,” se aplikata al lingvo, estas ĉiam metafora: lingvo estas natura nur en tio, ke ĝi estas uzata por ĉiuj celoj fare de sia parolantaro. Lingvoj estas formataj per arto kaj per ludado, kiuj neeviteble kondukas al ekapero de unika kulturo. Esperanto ekestis en la optimismo de la malfrua deknaŭa jarcento, sed ĝia ideologio evoluis tra la jaroj pere de ĝiaj parolantoj, kaj la lingvo kreskis kaj ekspaniis.

Emfazindas, ke ĝi ne estas teritorio de lingvofanatikuloj. Verdire, ĝi kongruas kun la eterna homa aspiro, gvidata de la poetoj, fari la lingvojn daŭre pli respondaj al homaj bezonoj.

Ĉu lingvistoj priatentu Esperanton?

de Grant Goodall

Profesoro pri Lingvistiko, Universitato de Kalifornio, San Diego

Dum la lastaj 50 jaroj anglalingvaj lingvistoj plejparte ignoras Esperanton kiel lingvon kaj kiel fenomenon. Mi argumentas, ke oni devas ŝanĝi tiun mankon de priatento, pro tio ke estas almenaŭ du ĝeneralaj kampoj, en kiu Esperanto povus ĵeti iom da lumo sur nuntempajn

demandojn. La unua kampo koncernas la rilaton inter la gramatikaj trajtoj de lingvo kaj ĝia rolo en la socio. La alveno de Esperanto kaj pluraj konkurantoj malfrue en la 19-a jarcento kaj ties malsamaj sortoj en postaj jardekoj prezentas ege interesan studkampon. Ekzistas pluraj pripensindaj kazoj, en kiuj ja ŝajnas, ke estis forta ligo inter la gramatikaj trajtoj de iu lingvo kaj ĝia socia rolo. La dua kampo estas la lingvoakirado, kaj ankaŭ en ĉi tiu kazo estas pensigaj demandoj, kiujn oni ĝis nun ne funde esploris. Kiel oni akiras Esperanton kiel la unuan lingvon, se la sola fonto de lingvaĵo por la infano ofte estas la gepatroj, kiuj ne estas denaskaj parolantoj de la lingvo? Kaj kion pri la akirado de Esperanto kiel dua lingvo? En tiu kazo denove la akirantoj devas plejparte utiligi nedenskajn parolantojn kiel fonton de lingvaĵo, malgraŭ la nekonstanta kaj kelkfoje erarplena karaktero de tiu lingvaĵo. Ĉu sukcesa lingvoakirado eblas en tiuj cirkonstancoj, kaj se jes, kial? Pli intensa esplorado en tiuj kampoj povus plibonigi niajn sciojn ne nur pri Esperanto mem, sed ankaŭ pri pli vastaj demandoj en la lingvistiko ĝenerale.

2.4.2 La resumoj de Sesio II: Esperanto kaj Edukado

Esperanto kaj fremdlingva edukado: Agademeco lingva aŭ teritoremece lingva

de Bonnie Fonseca-Greber

Asistantina Profesoro pri klasikaj kaj modernaj Lingvoj, Universitato de Louisville

De la vidpunkto de legitimeco lingva (Reagan & Osborn, 2002)³, la sesio proponata faras kritikon de la fako de fremdlingva edukado pere de studkazo rilate al la redakto kaj disvastiĝo de la studnormoj esperantaj, sponsoritaj tra kunlaboro de ACTFL⁴ kaj ESF, en kiu partoprenis la prelegantino kiel pretigistino de instruantoj de fremdaj lingvoj.

Malgraŭ financa subteno kaj partopreno estrata de ACTFL unue, la *Student Standards for Learning Esperanto K-16 in the United States* (2005), skribitaj dum la sama somero kiel la arabaj studnormoj, kiuj ankaŭ sekvis la ACTFL-a modelon, *Standards for Foreign Language Learning (SFL) in the 21st Century* (NSFLEP, 1999), la esperantaj studnormoj finfine ne aperis en la tria eldono de la SFL.

Argumentiĝos, ke tiu neatendita ŝanĝo rezultis de provo parte de la fremdlingva instruistaro mallingvigi esperanton por protekti ilian instrukampon, ĉefe de lingvo konata pro sia facileco de akirado (Maxwell, 1988) kaj pro sia kapablo faciligi la akiradon de aliaj lingvoj (Fantini & Reagan, 1992; Sherwood, 1982, 1983). Tiuj faktoroj interpretiĝos kiel minaco al la studado (kaj do, la registradaj numeroj) de la lingvo(j), kiu(j)n oni instruas, ĉefe kaze de malofte instruataj lingvoj.

Tiel tamen, la fremdlingva instruistaro malsuksecas atingi sian propran normon: la Normo 6.b de ACTFL/NCATE *Scii la valoron de fremdlingva akirado*. Kiel tiu studkazo montras, anstataŭ agadi fervore por la lingvo-akirado ĝenerale, la instruistaro disiĝas laŭlingve kaj luktas nur por la studado de sia propra lingvo por protekti sian teritorion, kaj do sian postenon.

³ La menciitaj bibliografiaj indikoj mankas en la tekstoj- Red.

⁴ Sigloj en la teksto:

ACTFL: American Council on the Teaching of Foreign Languages (Usona Konsilantaro por la Instruado de Fremdaj Lingvoj)

ESF: Esperantic Studies Foundation (Fonduso por la Studo de Lingvaj Problemoj)

SFL: Standards for Foreign Language Learning (Fremdlingvaj Studnormoj)

NCATE: National Council for the Accreditation of Teacher Education (Nacia Konsilantaro [Usona] por la Akredito de la Edukado de Instruistoj).

Instruado de Esperanto kiel subfosa pedagogio

de Timothy Reagan

Profesoro pri Edukado, Ŝtata Universitato de Centra Konektikuto

Kontraste al fakoj kiel TESOL (instruado de la angla por parolantoj de aliaj lingvoj) fremdlingvoj-edukistoj, precipe en Usono, restas plejparte sensciaj rilate al kritika pedagogio. Kiel notis Lourdes Ortega, “La fako de fremdlingva instruado ne rekonis la fakton, ke sociaj starpunktoj rilate lingvojn, kaj same ankaŭ potencoluktoj, rezultantaj el proprieto de lingvoj kaj kulturoj fare de difinitaj grupoj, estas nemalnodeble ligitaj al la difinado de celoj por lingvoedukado ... Necesas rekoncepti fremdlingvan edukadon kaj la fakon de fremdlingva instruado surbaze de la socikulturaj, politikaj kaj profesiaj fortoj, kiuj tuŝas la realojn kaj potencialojn de fremdlingvo-instruaj komunumoj.”

Mi kredas, ke, fundamente, tio konsistigas ŝlosilan problemon en fremdlingva edukado – problemon ankaŭ se temas pri klopodoj kreskigi lingvokonscion ĉe studentoj kaj aliaj. En tiu ĉi referaĵo mi esploras la potencialon de uzado de Esperanto por pretigi studentojn por estonta lingvostudado. Mi bazos mian argumenton je du rilataj demandoj: (1) utiligo de Esperanto en altigo de la lingvokonscio de studentoj (precipe *kritika* lingvokonscio), kiel dokumentite en la projekto *Lingvolanĉilo (Springboard to Language)*, kiu nun disvolviĝas en Britio, kaj (2) la jam empirie prezentita propedeŭtika valoro de Esperanto por antaŭenigi plian kaj aldonan lingvolernadon ĉe studentoj.

La resumoj de la prelegoj ankaŭ troveblas ĉe

<http://esperantic.org/dosieroj/file/islsabstracts2009.pdf>

Por pli da informoj pri la temoj de ĉi tiu gazetara komuniko, bv. kontakti ESF retroŝte ĉe admin@esperantic.org.

3 El universitatoj

3.1 Habilitiĝo de *Ilona Koutny* pri parolsintezo

La 23-an de aprilo 2009 ĉe la Adam-Mickiewicz-Universitato en Poznań habilitiĝis⁵ d-rino Ilona Koutny. Ŝi sukcese defendis (en la pola lingvo) la angle verkitan disertacion

Koutny, Ilona (2008): Natural Language Processing for Hungarian Speech Synthesis. Poznań: Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu. Serio językoznawstwo stosowane nr. 22., 198 p.

3.1.1 Resumo de la disertacio:

Naturlingva prilaboro en la hungara parolsintezo

La ĉeesto de komputiloj kaj interreto en la ĉiutaga vivo de homoj ĉe amuziĝo kaj konkretaj taskoj de informetrovo tra lernado ĝis la helpo al malavantaĝuloj postulas naturan komunikadon kun komputilo inkluzive parolkapablon. Konvena prozodio faciligas la komprenon, pro tio natureco estas postulo ankaŭ por sintezita parolo.

⁵ Habilito, habilitacio = universitat-profesora instrurajto, en kelkaj mezeŭropaj landoj donata nur post defendo de dua disertacio (Dr. habil., Dr. hab., Dr. sc.).

Helpe de parolkorpusoj eblas produkti sufiĉe naturajn, sed limigitajn mesaĝojn. Konteksto-parolo transformaj sistemoj havas aliron ankaŭ al eksterlingvaj fontoj. Teksto-parolo transformaj sistemoj (TtS: text-to-speech), kie la fomo kaj enhavo de la teksto ne estas limigitaj kaj tiel antaŭvideblaj, nepre bezonas lingvistikan analizon por produkti bonan prozodion. La trarigardo de **naturlingva prilaboro** (NLP: Natural Language Processing) en parolsintezo ilustras, kie la lingvoprilaboro ludas gravan rolon: ekde la transformo de specialaj signoj aperantaj en ordinaraj tekstoj al vortoj tra la unusencigo de elparolo sur segmenta nivelo (dank'al morfologia analizo) ĝis la determino de prozodio (dank'al sintaksa analizo). Kvankam la problemoj kaj iliaj solvoj diferencas de lingvoj al lingvoj, lingvosendependaj programoj povas plenumi la taskojn.

La hungara lingvo havas riĉan aglutinan morfologion, kiu disponigas bazon por la sintaksa analizo kaj la fokuso estas sintakse fiksita. La esploroj de la pasintaj du jardekoj (ĉefe tiuj de Katalin É. Kiss) multon malkovris pri la hungara frazstrukturo. Tiu ĉi disertaĵo celas determini rilatojn inter sintakso kaj prozodio, kaj tiel ellabori **interfacon sintakso-prozodio**, t.e. ellabori algoritmojn, kiuj elformas la prozodion de sintezita parolo. La analizo baziĝas sur bone formitaj frazoj (kiaj troviĝas en neŭtralaj informivaj tekstoj) kaj sur la norma hungara elparolo (kiun respregulas la laŭtleigitaj informoj kaj instrukcioj).

La priskribo de la hungara lingvo okazis enkadre de **dependosintakso**, ĉar la aŭtoro de la disertaĵo estas konvinkita, ke ĝi rezultigas pli adekvatan kaj simplan priskribon de la hungara lingvo, kiu havas relative liberan vortordon, sed ŝi prikonsideris ankaŭ la signifajn rezultojn de la reganta generativa-strukturalisma aliro. La supra priskribo estas la bazo de limigita sintaksa analizo (parsado), kies tasko estas identigi la strukture kaj funkcie gravajn frazkonstituantojn. La provo determini la **strukturen topiko-fokuso** ludas gravan rolon.

La komputila analizo de homa parolo estis elektita kiel metodo por ellabori la **hungaran modelon de interfaco sintakso-prozodio**. La aŭtoro kunmetis specialan frazaron (Anekso), kiun laŭtlegis sperta parolisto, kaj kiu poste estis analizata per la evoluiga sistemo de la hungara parolsintezilo Profivox. Prozodiaj ecoj estis kalkulitaj kaj komparitaj kun teoriaj rezultoj, se ili ekzistis. Surbaze de la konfirmitaj korelacioj inter frazstrukturo kaj prozodio ŝi formulis regulojn kaj testis tiujn per sintezo simulinte la rezultojn de la sintaksa analizo por la frazaro kaj aliaj testofrazoj, fine okazis ankaŭ aŭskulta testado. La eksperimentoj konfirmis rilatojn inter la frazstrukturo kaj prozodio.

La starigitaj reguloj kapablas determini sintagmolimojn, kie la intonacio povas ŝanĝiĝi kaj paŭzo povas okazi, krome distribui la akcentojn.

Trinivela intonacia modelo estis ellaborata por la hungara lingvo, kie la intonacio de frazo (eldiro) kunmetiĝas el (1) la baza melodio de eldiro, (2) la melodio de konsistigaj partoj de la frazo (tone groups – determinataj de la frazstrukturo) kaj el (3) vortakcentoj inklude la fokusakcenton (Koutny–Olaszy–Olaszi 2000).

La disertaĵo prezentas la **prozodion de diversaj fraztipoj** en la trinivela modelo kaj komparas ilin al la naturaj elparoloj. La rolo de la lasta sintagmo de la frazo en elparolo estas bone konata, sed la rolo de la interna strukturo nur nun ricevis klaran priskribon. Ankaŭ la alĝustiĝo de la elparolo de topiko al tiu de la komento estis ekzamenata (en neŭtralaj frazoj falanta kaj en emfazitaj frazoj leviĝanta). Tiu ĉi regulbaza modelo kapablas priskribi adekvate grandan parton de eldiroj.

Komenciĝis esploro ankaŭ en la direkto de tesktoanalizo. Tio kompletigas la frazanalizon, en kelkaj kazoj povas modifi la fraznivelan prozodion (disponigas aldonajn bazojn por trovi la fokuson), tiel la signifo de frazo estas pli klare interpretebla.

En la lasta parto du **specialaj aplikoj de parolsintezo** estas prezentataj: komputile asistata lingvoinstruado kaj la Bliss-sistemo destinita por helpi la pluroble malavantaĝulojn. La aŭtoro proponas limigitan lingvomodelon por Blissvox, la hungare parolanta versio de Bliss. La temo ankoraŭ postulas pluan esploron kaj en la tereno de frazstrukturo kaj de tekstostrukturo, plilarĝigon de la valentovortaro kaj inkludon de semantika prilaboro.

3.1.2 Biografio de *Ilona Koutny*

Ilona Koutny diplomiĝis pri matematiko, franca filologio kaj esperantologio en la Budapeŝta Eötvös Lorand-Universitato en 1977, doktoriĝis pri lingvistiko tie en 1990 kaj habilitiĝis en la poznana Mickiewicz-Universitato (PL) en 2009.

Unue ŝilaboris en la komputika tereno, poste kiel redaktisto, i.a. ĉe la iama Scienca Eldona Centro de UEA (1983-85). Ŝi okupiĝis pri parolprilaboro kunlabore kun la Budapeŝta Teknika Universitato, kunevoluigis la esperantan parolsintezan sistemon ESPAROL enkadre de plurlingva parolsinteza sistemo, kaj laboris pri la parolantaj instruprogramoj PAROLERN. Ŝi ankaŭ kunlaboris kun la maŝintraduka DLT-projekto. Post la morto de prof. István Szerdahelyi en 1987, ŝi transprenis la instruadon de esperantaj lingvo kaj lingvistiko ĉe la Lingvistika Katedro de Eötvös-Universitato. Tie ŝi prelegis ankaŭ pri komputa lingvistiko. Ŝi prezidis la Ekzamenan komisionon de Hungaria Esperanto -Asocio.

En 1996 ŝi translokiĝis al Pollando, kie ŝi instruas en la Lingvistika Instituto de la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (hungarajn lingvon kaj lingvistikon). En 1997 ŝi fondis tie kaj daŭre gvidas la internaciajn postdiplomajn Interlingvistikajn Studojn, prelegas pri esperanta gramatiko kaj internacia kaj interkultura komunikado.

Ŝi krome estas Asista docento ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino, membro de UEA, ILEI, CED kaj ekde 1998 de la Akademio de Esperanto. Ŝi ofte prelegas pri sciencaj temoj en diversaj forumoj (IKU, Esperantologia konferenco, AIS-sesioj, KCE), gvidas esperantajn kursojn en diversaj niveloj (ekz. dufoje en Usono en la somera universitato) kaj publikigas en kelkaj lingvoj.

Ŝi kunredaktis la Hungaran-Esperantan vortaron (1996 kun Szerdahelyi) kaj la Hungaran-polan temvortaron (2000 kun koleginioj). Ŝi laboras pri la plurlingva projekto Strukturita Esperanta Temvortaro, kies 3 volumoj kun leksikaj kaj komunikaj ekzercoj jam aperis: Angla-Esperanta-Hungara etvortaro pri Lernado kaj Laboro (2002), Lingvo kaj Komunikado (2003), Homa vivo kaj Loĝado (2005). Aldoniĝis la Germana-Esperanta-Pola versio de Lingvo kaj Komunikado en 2008.

3.1.3 Publicaĵoj de *Ilona Koutny*

(* Publicaĵoj kun rilatoj al interlingvistiko/esperantologio. Ref: = surbaze de referaĵo. Anglajn klarigojn aŭ titolojn ni ne tradukis-Red.)

Artikoloj

1984

* Diversaj aspektoj de perkomputila tekstoprilaboro. En: Internacia Komputado 1984, n-ro 2, Budapeŝt: MESZ, 4-7.

1985

- * Problemoj de esperanto en la aŭtomata tekstoprilaboro. En: Planlingvistiko 1985, n-ro 3, La-Chaux-de-Fonds: LF-Koop., 7-13. Ref.

1988

- A VERBIDENT-SD-2 izolált szavas gépi beszédfelismerő (Komputila parolrekonilo de izolitaj vortoj VERBIDENT-SD-2), kun G.Magyar, A.Faragó, G.Gordos, L.Osváth, G.Takács, En: Híradástechnika 1988, n-ro 3, 111-115.
- The Isolated Word Recognizer Verbident, kun: A.Faragó, G.Gordos, G.Magyar, L.Osváth, En: Budapesti Akusztikai Kollokvium 1988, n-ro 9, 115-119. .Ref.
- * Automatic Synthesis of Esperanto, kun: G.Olaszy, L.Czap En: Budapesti Akusztikai Kollokvium 1988, n-ro 9, 132-137. Ref.
- * Esperanto Speech Synthesis and its Application in Language Learning, kun: G.Olaszy, K.Kisfaludy, En: Magyar Fonetikai Füzetek 1988, n-ro 19, Budapest: Nyelvtud. Int., 47-54.
- * La rolo de komputilo en la instruprocezo. En: Internacia Pedagogia Revuo 1988, n-ro 4, 1-6.
- * Komputila parolgenero. En: Fokuso 1988, n-ro 4, 48-54.

1989

- * Számítógépes beszédelőállítás a nyelvoktatásban (Komputila parolgenero en la instruado de lingvoj, En: AV kommunikáció 1989, n-ro 1, 32-34.
- Teaching of Hungarian to Foreigners by Speaking Computer, kun: G.Olaszy, En: Proc. of Speech Research 1989, Budapest, MTA Nyelvtud. Int., 277-280. Ref.
- Some Research on Phonetically Based Speech Recognition, kun: G.Gordos, L.Osváth, En: Proc. of Speech Research, 1989, Budapest, MTA Nyelvtud. Int. Ref.
- A dependency syntax of Hungarian, kun: G.Prószéky, B.Wacha, En: Metataxis in practice. Dependency syntax for multilingual machine translation, DLT 6, red. K.Schubert. Dordrecht: Foris, 1989, 151-181.

1990

- * Magyar-eszperantó gépi fordítási modell (Hungara-esperanta maŝintraduka modelo), En: Emlékkönyv Zsilka János prof. 60. születésnapjára, Budapest, ELTE, 1990.

1991

- Magyar nyelvtan függőségi alapon (Hungara gramatiko surbaze de dependecoj), kun: B.Wacha, En: Magyar Nyelvőr 1991, n-ro 4.
- * A Speaking Computer for Language Learning, kun: G.Olaszy, En: New Media in the Humanities, red. J.Janssen, H.van Loon, Amsterdam, University of Amsterdam, 1991, 159-165. Ref.
- * PAROLERN: A Speaking Authoring Program Package, En: EUROCALL 1991, Int. Conference on Computer Assisted Language Learning, Helsinki, Helsinki School of Economics, 1991, 62-69. Ref.
- * Komputila parolrekono. En: Scienca Revuo 1991, n-ro 1, 6-13. Ref.

1993

- * Latintól az eszperantóig (De latino ĝis Esperanto). En: Állapot és változás. Budapest: ELTE, 1993, 121-127. Ref.

1994

- * Nyelvtanulás beszélő számítógéppel (a PAROLERN szerzői rendszer bemutatásával) 'Language learning with a speaking computer (kun demonstro de la sistemo Parolern, verkita de la aŭtorino)', En: II. Magyar Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia 1992, Veszprém: Egyetemi Kiadó 1994, 41-44. Ref.

- Nyelvtudás - kommunikáció - kulturális háttér (Lingvosocio – komunikado – kultura fono), En: Nyelv Info 1994, n-ro 3.
- Nyelvi és kulturális kommunikáció az idegen nyelven (Lingva kaj kultura komunikado en fremda lingvo), En: IV. Magyar Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia 1994, Budapest: BME, 1994, 558-564. Ref.
- * Fonetika fono kaj realigo de esperantlingva elektronika parolgenero kun: G.Olaszy, En: Aktoj de Internacia Scienca Simpozio: Esperanto 100-jara, 1987, red. H.M.Maitzen, H.Mayer, Z.Tisljar, Vieno: ELA, Pro Esperanto, Maribor: Inter Kulturo, 1994, 187-202. Ref.
- * Komunikado inter homo kaj maŝino. Comunicazione tra uomo e macchina. En: 6-a konferenco de esperantistoj de Alp-Adrio. Trieste 1994. 67-79. Ref.
- Nyelvelemzés a beszédfeldolgozásban (Lingvoanalizo en parolprilaboro), En: Beszédkutatás 1994, red. M.Gósy, Budapest 1994, MTA Nyelvtud. Int., 152-163. Ref.
- 1996**
- Magyar mondatok morfológiai és szintaktikai generálása korlátozott szókincs és nyelvtan alapján a beszélő BLISSVOX rendszerben (Morfologia kaj sintaksa genero de hungaraj frazoj surbaze de limigitaj vortaro kaj gramatiko en la parolanta BLISSVOX sistemo), En: prelegaro de VI. Magyar Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia 1996. Ref.
- 1997**
- * Hungara-esperanta maŝintraduka modelo. En: Struktura kaj Socilingvistika Esploro de Esperanto. Red. I.Koutny kaj M. Kovács. 1997. Budapest, Steleto & ILEI. 153-161. Esperanta versio de la antaŭa artikolo. Ref.
- Magyar és lengyel kultúra találkozása egy tematikus szótár keretében (Renkontiĝo de hungara kaj pola kulturoj en la kadro de temvortaro). En: prelegaro de VII. Magyar Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia 1997. 77-80. Ref.
- * Kultúrák közötti kapcsolat egy vagy több nyelven? (Kontakto inter kulturoj en unu au en pluraj lingvoj?) En: VII. Magyar Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia 1997. 73-76. Ref.
- 1998**
- Handling Some Hungarian Structures in Dependency Framework for Natural Language Processing. En: Lingua Posnaniensis 1998, 89-101.
- * Esperanta leksikografio kaj la Hungara–Esperanta vortaro. En: Gecső T. – Varga-Haszonits Zs. (red.): Memorlibro. 1998. Budapest: ELTE. Ref.
- Kísérlet magyar nyelvű megnyilatkozások prozódiai jellemzőinek automatikus meghatározására ‘Automatic determination of prosodic features of Hungarian utterances’. En: Gósy M. (red. 1998): Beszédkutatás ’98. Budapest: MTA Nyelvtudományi Intézet. 223-235. Ref.
- * Interkultura komunikado. En: Wandel, A. (red. 1998): Internacia Kongresa Universitato. Rotterdam: UEA. , p. 9-21, Ref.
- Szótárak szerepe a nyelvtanulásban egy készülő magyar tematikus szótár kapcsán ‘Role of dictionaries in language learning based on the ongoing Hungarian thematic dictionary’. En: NyelvInfo 1998/június and En: 8. Országos Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia. 1998. Szombathely: BDTF. 337-340. Ref.
- * Az eszperantó hangrendszere és kiejtési normája a beszédszintézis szemszögéből ‘Sound system and pronunciation norm of Esperanto from the point of view of speech synthesis’(Sonsistemo kaj prononca normo de Esperanto vidpunkte de parolsintezo) . En: 8. Országos Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia. 1998. Szombathely: BDTF. 271-276. Ref.

1999

- Nyelvészeti modellen alapuló beszéd szintézis a többszörösen fogyatékos gyerekek kommunikációját segítő BLISSVOX rendszerben 'Speech synthesis based on linguistic modeling in the Blissvox system helping the communication of manifold disabled children'. En: *Beszédgyógyítás* 99/1-2. 14-20.
- Linguistic Reflection of Culture of the Time of Transition in Hungary and Poland. En: Brendel J. (red): *Culture of the Time of Transformation – II International Congress: The Cultural Identity of the Central-Eastern Europe*. Poznań 1999. 88-96. Ref.
- Language Processing for the Hungarian Speaking BLISSVOX System in order to Help the Disabled. En: *Speech and Language Technology*. Vol. 3. W. Jassem, Cz. Basztura, G. Demenko, K. Jassem (red.) 1999. Poznań. 81-88. Ref.
- Parsing Hungarian Sentences in order to Determine their Prosodic Structures in a Multilingual TTS System. En: *Proceedings of Eurospeech '99*. 1999 Budapest, 2091–2094. Ref.
- kun Olaszi P., Olaszy G., Németh G.: Syntactic Analysis of Hungarian Sentences to Predict Prosodic Information for Speech Synthesis; En: *Proceedings of the Polish-Czech-Hungarian Workshop on Circuit Theory, Signal Processing and Applications*. B. Galiński, B. Świdzińska, (red.) Krakow, 1999. Ref.

2000

- kun Olaszy G: Stress, Focus and Tempo in Hungarian Sentences for TTS Conversion. En: *Speech and Language Technology*. Vol. 4. Part 1. W. Jassem, Cz. Basztura, G. Demenko (red.) 2000. Poznań. 57-70.
- Magyar és lengyel udvariassági fordulatok összevetése a lexikográfus szemével 'Comparison of Hungarian and Polish politeness forms from the viewpoint of a lexicographer'. En: Bańczerowski, Janusz (red) 2000: *Polono-Hungarica* 8. Budapest: ELTE. 268-279.
- kun Olaszy, G., Olaszi, P.: Prosody Prediction from Text in Hungarian and its Realization in TTS conversion. En: *International Journal of Speech Technology*, Volume 3, No. 3/4, December 2000. 187-200.

2001

- * Defioj de moderna leksikografio por Esperanto. En: Fiedler, Sabine, Liu Haitao (red.): *Studoj pri interlingvistiko. Festlibro omaĝe al la 60-jariĝo de Detlev Blanke. Studien zur Interlinguistik. Festschrift für Detlev Blanke zum 60. Geburtstag*. Dobřichovice [ĉe Prago]: KAVA-PECH 2001. 660-674.
- * Speech Processing and Esperanto. En: *Interface. Journal of Applied Linguistics* 2000/1, 99-120. kaj en: *Planned Languages: From Concept to Reality*. Klaus Schubert (red.) 2001. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst.
- Olaszy G., Ilona Koutny: Intonation of Hungarian questions and their prediction from text. En: G. Demenko, M. Karpiński, K. Jassem (eds 2001) *Speech and Language Technology*. Vol. 5. Poznań: PTF. 39-57. kaj en: S. Puppel – G. Demenko (eds): *Prosody 2000*. Poznań: UAM. 2001. 179-196. Ref.
- Syntax and prosody: Case-study of Hungarian. En: S. Puppel – G. Demenko (eds): *Prosody 2000*. Poznań: UAM. 2001. 119-125. Ref.
- A fogalomosztályozástól a tematikus szótárákig 'From notion classification to thematic dictionaries'. En: *Hungaro-Slavica* 2001. *Studia in honorem Jani Banczerowski. István Nyomárkay* (red.). ELTE, Szlav és Balti Filológiai Intézet. Budapest. 113-121.
- * De nociklasifiko ĝis temvortaroj. Esperanta vortprovizo en temgrupoj 'From classification of notions until thematic dictionaries: Esperanto vocabulary in thematic groups'. En: Ch. Kiselman – G. Mattos (2001): *Lingva planado kaj leksikologio. Language Planning and Lexicology*. Chapeco-SC: Fonto & Akademio de Esperanto. 189-198. Ref.

- * Universitata instruado kaj instruista trejnado 'Teaching at university and teachers' training'. En: Internacia Pedagogia Revuo 2001/4. 13-21. Ref.
- * How terminology can be included in a dictionary. Experience with the Hungarian-Esperanto dictionary. En: M. Górní – P. Nowak (red.): *Miscellanea informatologica*. Sorus. 2001. 9-17.
- * Computer-Aided Language Learning and Synthesized Speech. En: P. Nowak, P. Wierchoń (red.): *Contemporary communication and information systems: selected problems..* Poznań: Sorus 2001. 9-21.

2002

- Olaszi, P., Ilona Koutny: From Bliss symbols to grammatically correct voice output: a communication tool for the handicapped. En: *International Journal of Speech Technology* 2002/1, 49-56
- Topic-Focus Structure in Hungarian and its Automatic Identification. En: *Lingua Posnaniensis* XLIV, 2002. 65-78.
- Prozódia a szintetizált magyar beszédben 'Prosody in the synthesized Hungarian Speech'. 12. Országos Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia. 2002 Szeged, manuscript. Ref
- * Lexikographie und die Bedeutung eines Esperanto-Korpus. En: Detlev Blanke (ed. 2003): *Plansprachen und elektronische Medien*. Interlinguistische Informationen. Beiheft 9 – Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik, 2002, Berlin. Berlin: GIL. 2003, 77-97 Ref.

2003

- Points de repère syntaxiques pour la prosodie du hongrois 'Syntactic Cues of Prosody in Hungarian'. En: *Proceedings of Prosodic Interfaces*. Mettouchi, A., Ferré, G. (eds.) Nantes: a.a.i. 2003. 123-126. Ref.
- * La obstinaj radikoj 'The obstinate roots'. *Pola Esperantisto* 2003/2. 48-49.
 - * Mondo, lingvo kaj vortaro 'World, language and dictionary'. *Pola Esperantisto* 2003/6. 182-185. Ref.
 - * Korpuszal támogatott szótárkészítés 'Corpus based Dictionary making'. 13. Országos Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia. 2003 Győr, manuscript. Ref.
- kun Dávid Mária: Pragmatic Aspects of the Acquisition of Hungarian, at Poznan Linguistic Meeting 2003 Poznan. manuscript. Ref.

Mondatelemzés a beszédszintézis szolgálatában, avagy a magyar mondatszerkezet és a prozódia kapcsolata 'Parsing in the service of speech synthesis or the relation of Hungarian sentence structure and prosody' to appear in the proceedings of Nyelvtanítás a kultúrán keresztül. Hungarológiai konferencia in Warszawa, Ref.

2004

- Hungarian greetings and addressing forms in a cross-cultural approach. En: *Modern Filológiai Közlemények* 2004/1. 5-20
- Nyelvi és nyelven kívüli ismeretek a szótárban 'Linguistic and extralinguistic knowledge in dictionaries'. En: Tóth Szergej – Földes Csaba – Fóris Ágota (2004): *Lexikológiai és lexikográfiai látkép: problémák, paradigmák, perspektívák*. „Fasciculi Linguistici Series Lexicographica” 3. Szeged: Generalia.. 69-77 Ref. por 11. Országos Alkalmazott Nyelvészeti Konferencia. 2001. Szeged.
- * Komunikacja międzykulturowa w Europie: angielski i esperanto jako alternatywne środki komunikacji. En: B. Gorińska-Bittner (red.): *Inna (?) Europa*. 2004. Poznań: Akademia Rolnicza. 73-95.

kun Dávid Mária. A poznani Magyar Szak 10 éve '10 years of the Hungarian Studies in Poznan'. En: *Hungarológia: Nyelv és kultúra*. I. Koutny (red.). Poznań: ProDruk 2004 25-36. and to appear in the proceedings of Nyelvtanítás a kultúrán keresztül. Hungarológiai konferencia in Warszawa, 2003. Ref.

A magyar pragmatika néhány problémája 'Some problems of Hungarian Pragmatics' En: *Hungarológia: Nyelv és kultúra*. I. Koutny (red.). Poznan: ProDruk 2004 175-193

* A fogalomtól a nyelvi kifejezésig 'From concept to linguistic expression' 2004. En: "...még onnét is eljutni túlra..." Nyelvészeti és irodalmi tanulmányok Horváth Katalin tiszteletére. Eds. Ladányi Mária, Dér Csilla, Hattyár Helga. Budapest: TINTA Könyvkiadó. 361-368.

A 3. út: a tetszikelés 'The 3rd way: the "tetszikelés"'. Ref. at the International Congress of Hungarian Linguists 2004. <http://www.nytud.hu/NMNYK/eloadas/koutny-ho.rtf> Ref.

2005

* Computational Tools for Elaboration and Functioning of a Multilingual Thematic Dictionary. En: Vetulani, Z. (ed. 2005): *Human Language Technologies as a Challenge for Computer Science and Linguistics*. Proc. of the 2nd Language & Technology Conference. Poznan: Wydawnictwo Poznanskie Sp. z.o.o. 41-44. Ref.

* A Corpora Assisted Multilingual Thematic Dictionary. En: *Archives of Control Sciences* 2005/3. 251-260.

* Interkultura komunikado en Europo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj 'Intercultural communication in Europe: English and Esperanto as alternative communication tools'. 2005. En: Symposium on Communication Across Cultural Boundaries. Ed. Ch. Kiselman. Dobrichovice: Kava-Pech. 115-132. Ref. at the joint "Symposium on Intercultural communication" of the Swedish and Esperanto Academies in Gotenborg, 2003.

Some aspects of discourse analysis for the synthesis of Hungarian prosody. En: Demenko, G. (ed. 2005): *Speech Analysis, Synthesis and Recognition. Application of Phonetics*. Conf. Proc. On CD. Ref.

Język węgierski. 2005. En: Encyklopedia Britannica 46. Poznań: Kurpisz. p.1.

2006

Text structure and prosody in Hungarian. *Speech and Language Technology IX*. 2006. Poznan: PTFON

Prosody of Hungarian Imperative Sentences. Paper presented on the conference *Speech Signal Annotation, Processing and Synthesis*, Poznań 2006. En: *Speech and Language Technology X*. PTFON

* The research evidence in favor of learning Esperanto in mainstream education. Paper presented on the Conference on Language Policy of EU. Bratislava. 2006. manuscript.

Mennyiben magyar színek a piros fehér zöld? Kontrasztív frazeológiai vizsgálat. 'To what extent are red, white and green Hungarian colors? A contrastive fraseologic investigation.' Paper presented on the International Congress on Hungaryology 2006. En: HUN. Nyelv, nemzet, identitás II. Ed. Maticsák Sándor. Debrecen–Budapest: Nemzetközi Magyarásztudományi Társaság. 2007. 229-238.

2007

* Rimarkoj pri la esperanta semantiko 'Remarks on the semantics of Esperanto'. En: *Literatura Foiro* 228, 2007 / agosto 218-222.

The relation between the structure and prosody of complex sentences in Hungarian. En: *Human Language Technologies as a Challenge for Computer Science and Linguistics*. Proceedings of the 3rd Language and Technology Conference, Poznan. Ed. Zygmunt Vetulani. Poznań: Fundacja UAM. 2007. 246-249.

A magyar mondatszerkezet és a prozódia kapcsolata. 'Relation between syntactic structure and prosody of Hungarian sentences'. En: Mozaikok a hazai telematika eredményeiből 'From the results of Hungarian telematics', Festschrift for Géza Gordos. Ed. Talyigás Judit. Budapest: Híradástechnikai Egyesület. 2007. 28-36.

2008

- * Egy tervezett nyelv a nyelvi univerzálék és a nyelvtipológia tükrében 'A planned language in the framework of language universals and typology' En: Festschrift for Ferenc Havas. 2008
- * Instruado de vortprovizo. En: IPR 2008/1
- * Natural Language Processing for Hungarian Speech Synthesis. Poznan: Wydawnictwo Naukowe UAM. 2008. 200 p.

2009

- * Esperantlingva bildo de la mondo. 2009 (aperonta).

Recenzoj

- * Új irányzatok a gépi fordításban (Novaj direktoj en maŝina tradukado, konferenco en 1988). En: Magyar Nyelvőr 1989/3. 380-384.
- * Struktura kaj socilingvistika esploro de esperanto (konferenco en 1988). En: Language Problems and Language Planning. 1989 spring, 161-162.
- * Klaus Schubert (1987): Metataxis. Contrastive Dependency Syntax for Machine Translation, En: Linguistics 1990/3, 612-616.
- Sovijarvi A. and Reijo A. (1994): Synthesis of Certain Speech Sounds and Sentence Intonation of Hungarian, Finnish and Finland Swedish. Helsinki. En: the Phonetician, CL70. 1995-96.
- * Maria Ballendū-Bogyay: Hungara lingvokurso. Al Esperanto adaptis Marc Vanden Bempt. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1990. 384 p. En: Revuo Esperanto 1996.
- * Nepre uzenda 'Absolutely for use': William Auld (2001 tria eldono reviziita kaj kompletigita): Paŝoj al plena posedo. Perfektiga krestomatia lernolibro. La Chaux-de-Fonds: LF-koop. En: La Ondo 2002/4 15.
- * Nemalhavebla, modela verko de leksikografio 'Indispensable model work of lexicography': Erich-Dieter Krause (1999): Grosses Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Hamburg: Helmut Buske Verlag. En: Revuo Esperanto. 2003/3 62-63.
- * Reviser of the linguistic vocabulary of the dictionary La nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. 2002. G. Waringhien (ed.). M. Duc Goninaz (ed. 2nd ed.) Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda.
- * kun Bradius V. Maurus III. 2007. *Interlinguistische Beiträge: Zum Wesen und zur Funktion internationaler Plansprachen* de Detlev Blanke, redaktita de Sabine Fiedler (Frankfurt am Main: Peter Lang GmbH) En: Lingua Posnaniensis XLIX, 2007, 221-227.

Eldonado

- * INTERKOMPUTO'82, vol. 1-6. Budapest: NJSZT.
- * Perkomputila Tekstoprilaboro, Budapest 1985, MESZ - SEC.
- * INTERKIBERNETIK, with: A.Lukács, P.Broczkó, Budapest 1986, NJSZT.
- * Struktura kaj Socilingvistika Esploro de Esperanto, with M. Kovács. 1997. Budapest: Steleto, ILEI
Hungarológia: Nyelv és kultúra. Hungarologia: Język i kultura. Poznań: ProDruk 2004

Vortaroj

- * Szerdahelyi István – (1996): *Hungara-Esperanta meza vortaro* 'Hungarian-Esperanto medium size dictionary'. Budapest: HEA. 836 p.

- kun J. Jarmołowicz, Cs. Gizińska, Emília Fórizs: *Węgiersko-polski słownik tematyczny*. 2000. Poznań: ProDruk. 438 p.
- * *English-Esperanto-Hungarian mini-dictionary on Education and Work*. Poznan: ProDruk. 2002. 146 p.
- * *English-Esperanto-Hungarian mini-dictionary on Language and Communication*. Poznan: ProDruk. 2003. 126 p.
- * *English-Esperanto-Hungarian mini-dictionary on Human Life and Housing*. Poznan: ProDruk. 2005. 162 p.
- * kun Aida Cizikaite. *English-Esperanto-Lithuanian mini-dictionary on Education and Work*. Poznan: ProDruk & Kaunas: Lietuvos esperantininku sajunga. 2005. 146 p.
- * kun Aida Cizikaite. *English-Esperanto-Lithuanian mini-dictionary on Language and Communication*. Kaunas. 130 p. aperonta
- * kun Cyril Brosch, Maciej Jaskot, Horst Vogt. *Germana-Esperanta-Pola etvortaro pri Lingvo kaj Komunikado*. Poznan: ProDruk. 2008. 142 p.

3.2 Doktorîgo de *Oksana Burkina* pri fonologio de Esperanto

La 23-an de aprilo 2009, la sanktpeterburga filologo *Oksana Burkina* akiris la gradon de kandidato de sciencoj (en la okcidenteŭropa akademititola sistemo doktoro) ĉe Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato, fakultato de filologio. Ŝi sukcese defendis disertacion kun la temo “Prononca normo en Esperanto”. La scienca gvidanto de la verko estis la docento de Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato, kandidato de sciencoj, *Viktoria B. Gulida*.

La verkon ekzamenis la sekvaj doktoroj, membroj de Scienca Konsilio, kiu decidis pri aljuĝo de la grado: *Fatima A. Eloeva, Aleksandr Y. Rusakov, Maria D. Voejkova, Yuri A. Klejner, Vadim B. Kaseviĉ*. Ekspertizoj venis ankaŭ de jenaj oponentoj: doktoro *Nikolaj B. Vahtin* (Eŭropa Universitato en Peterburgo) kaj *prof. d-ro Sergej N. Kuznecov* (Moskva Ŝtata Universitato). La ekspertizon de organizo sendis Perma Ŝtata Universitato, katedro pri ĝenerala lingvistiko kaj slavistiko. Aldonaj reagoj al la referaĵo de la disertacio ankaŭ venis de *d-rino habil. Cornelia Mannewitz* (Universitato de Greifswald), *prof. d-ro Wim Jansen* (Universitato de Amsterdamo) kaj *d-rino Kapitolina S. Fjodorova* (Eŭropa Universitato en Peterburgo).

Jen la presita “referaĵo” al la disertacio (kutima en Rusio, kun funkcio komparebla al defendendaj tezoj en okcidenteŭropaj universitatoj):

Burkina, Oksana Viktorovna (2009): Proiznositel'naja norma v Ĕsperanto. Avtoreferat dissertacii na soiskanie uĉennoj stepeni kandidata filologiĉeskih nayk. Sankt-Peterburg: Sankt-Peterburgskij gosudarstvennyi universitet (Special'nost' 10.02.19 – Torija jazyka), 26 p.

3.2.1 Resumo de la disertacio

La esploro fokusiĝis sur la specifeco de unuiga prononco en mondlingvoj, en kiuj ekzistas grandega variado kaj plia diverseco de tipoj de parolantoj kompare al nacia lingvo, kaj samtempe ne ekzistas stabiligaj normaj preskriboj sur ŝtata nivelo. Nuntempe oni diskutas la normon de la Internacia Angla kontraste al naciaj formoj de tiu lingvo. La Internacia Angla kaj Esperanto funkcie koincidas, kaj tiamaniere esploro de Esperanto, kiu – laŭ opinio de kelkaj esperantologoj – jam havas prononcan normon, povas doni gravajn informojn por lingvistoj en la esploro de la normo en eksternacia kadro. Kiuj procedoj rolas dum la

elformiĝo de normo? De aparta intereso estas sociaj apartaĵoj de la normo, malsama al la nacia, kiu kutime baziĝas sur tradicia sociklasa hierarkio.

La celo de la esploro estis eltrovi, per uzo de modernaj sociolingvistikaj metodoj, kiu bazo ekzistas por la menciita opinio pri la ekzistanta prononca normo, kaj montri fonetikajn apartaĵojn de tiu normo per uzo de objektivaj fonetikaj esplormetodoj. La disertacio konsistas el kvar ĉapitroj kaj konkludoj.

(1) La unua ĉapitro temas pri la *teorio de normo*. Ĝi traktas tezojn pri la lingva kaj socia enhavo de normo, formulitajn surbaze de naciaj esploroj (interrilato de uzo, sistemo kaj normo; sociaj trajtoj de normparolantoj, historia kaj ŝtata determineco, loka kaj preskriptiva normo, lingvaj pritaksoj ktp); aparte diskutatas la prononca normo (inkluzive de demandoj pri ortoepio vs ortofonio, tipoj kaj stiloj de prononco, interrilato de skriba kaj buŝa formoj de lingvo). Analizatas malsameco de normo en nacia lingvo kaj normo de planlingvo. Ankaŭ diskutatas la specifeco de komunikado sur internacia nivelo (socie kaj psikolingvistike) kaj la problemo de normkriterioj por tiutipa lingvo. Komparatas la ideala fonologia sistemo por mondlingvo, ellaborita de N. Trubeckoj, la sistemo por Internacia Angla de J. Jenkins kaj la sistemo de Esperanto (la sistemo de Esperanto aperas esti pli proksima al idealo, ol la sistemo de Internacia Angla).

(2) La dua ĉapitro *priskribas Esperanton*: moderna funkciado de la lingvo, kiu ebligas la komparon kun naturaj lingvoj kaj samtempe montras planlingvan specifecon; la komunumo kaj tipoj de lingvoportantoj; enlingvaj kaj sociaj faktoroj, kiuj influas la elformiĝon de unueca prononco. Por respondi al la demando pri ekzisto de prononca normo en Esperanto bezonatas informo, kiuj konataj kriterioj de normo ekzistas en Esperanto. Ĉu la esperantistaro havas certan elformiĝintan imagon pri la norma prononca varianto kaj ĉu oni specife rilatas al ĝi? Kiu estas portanto de tiu prononcvarianto? Kiujn lingvistikajn trajtojn havas tiu prononcvarianto konsiderante lingvistikan specifecon de Esperanto?

Priskribatas kaj analizatas la fonologia sistemo de Esperanto kaj ties realiĝo ekde Zamenhof (kies rekomendoj estas ne sen kontraŭdiroj) ĝis la nuntempo. Krom preskriboj de iniciatinto de Esperanto kaj liaj postsekvuloj (“oficiala lingvopolitiko”), kiuj plejparte estas direktitaj al minimaligo de variado kaj konkretigo de alofonoj, analizatas la “popola lingva politiko”, kiu aperas i.a. kiel pritakso de akĉentoj. Fakte negativa pritakso de akĉento funkcias kiel mekanismo de elformiĝo de norma prononco kun superetnolekta karakterizo. Se paroli pri la nuntempo, imageblas malsamaj direktoj de evoluo de la prononco. Kialoj por malvastiĝo de variado en normo estas la planlingva esenco de Esperanto, konscia plenumo de preskriboj fare de la komunumo, aŭ ebla stabiliĝo de normo sur certa etnolekto pro konataj stereotipaj preferoj en la komunumo. Tamen ankaŭ ekzistas kialoj por vastiĝo de la variado: la kontingento de parolantoj vastiĝis kvante kaj kvalite, la lingvo aktive uzatas buŝe en variaj ĝenroj kaj stiloj, la komunumo aprezas principojn de demokratio kaj egaleco.

(3) Ĉapitro tri estas dediĉita al *sociolingvistika eksperimento*. 25 voĉoj de Esperanto-parolantoj kun malsamaj lingvaj kaj sociaj karakterizoj (gepatra lingvo, akĉentgrado, aĝo, sekso, eduko, profesio, Esperanto-sperto kaj statuso ktp) estis prezentataj al 131 esperantistoj (la aŭskultantoj ne estis informitaj pri la sociaj trajtoj de parolantoj, inkluzive nomon). En la unua parto ili aŭskultis voĉojn en hazarda vico kaj pritaksis la prononcon de la parolantoj je du skaloj – poenta kaj kvalita. Aldone ili havis la eblecon doni liberan komenton pri la aŭskultito. En la dua parto ili respondis al la demandoj de la enketo: al la kutimaj demandoj pri sociaj karakterizoj (aĝo, eduko ktp) kaj al la specifaj pri lingva sperto (fremdaj lingvoj parolataj, Esperanta staĝo, aktiveco de uzado, internacia aŭ loka nivelo de uzado ktp).

Post statistika prilaboro de pritaksoj laŭ poenta skalo estis elformita la listo de parolantoj.

Akĉento kaj gepatra lingvo:

Okazis, ke la pozicio de parolanto en la rangolisto (t.e. pritakso de lia prononco fare de aŭskultantaro) dependas de la grado de akĉento. Ju pli ĝi aŭdeblis, des pli malaltan pritakson ricevis la parolanto. Aliaj karakterizoj de parolantoj ne rolis. Ekzistantaj en komunumo stereotipoj pri (mal)preferebleco de apartaj etnolektoj konfirmiĝis nur parte, nome en negativaj pritaksoj en la sfero de fortaj akĉentoj. Tiel la faktoro de gepatra lingvo ne montris sin absolute signifa. La portanto de norma prononco estas esperantisto kun ajna gepatra lingvo, kaj fonetike la normo estas superetnolekta varianto, kiu socie valoras. La statistiko montris la eŭropocentrisman tendencon en la pritaksoj. Menciendas, ke inter la aŭskultantaro plimultis eŭropanoj, kio povas esti kialo. Bezonatas plua esploro.

Unueco de opinioj en komunumo:

La normo kiel socia fenomeno estas definita ne de unuopulo sed de komunumo. La kelkflanka statistika prilaboro de datenoj donis la rezulton, ke la Esperanto-komunumo montras tre altan unuecon en siaj opinioj. Konstateblas, ke prononca normo ekzistas en la komunuma konscio kaj ekzistas kiel socia fenomeno.

La kvalita skalo korelaciis kun poenta skalo kaj montris sian aktualecon. En Esperanto funkcias kelkaj trajtoj de norma varianto, konataj el naciaj lingvoj: superetnolekta karaktero, korekteco, preferebleco, prestiĝo. La kriterio de komprenebleco, multe menciata en esperantlingvaj verkoj kaj fare de informantaj el la komunumo, ne korelaciis kun la poenta skalo kaj fakte apartenis ne tiom al la kvalito de elparolo, kiom al la sperto de la aŭskultanto. Se paroli pri sociaj karakterizoj, aperis malsamaĵoj al tio, kion ni konas el nacia lingvo: socia klaso, vivloko, eduknivelo; sekso ne rolas en Esperanto. La socia prestiĝo, ligita kun norma prononco, ekzistas, sed havas alian enhavon kompare kun naciaj lingvoj.

Aparte interesa estis informoj, ricevataj en la „libera komento“ de la aŭskultantaro. Menciendas multo, tamen ĉi-tie donatu nur kelkaj informoj: aperis novaj gravaj pritaksoj: fremda/malfremda, artefarita/natura elparolo. La lasta estas aparte interesa por t.n. artefarita lingvo kun moderna natura stato, ĝi ankaŭ ligitas laŭ la opinio de la aŭtoro al elformiĝantaj prononcestiloj de Esperanto. Aperis ankaŭ certaj preferoj pri prosodiaj karakterizoj, kio mankas en ĉiuj libroj – oni koncentriĝas kutime nur al apartaj segmentoj. Tio denove montras al ni la naturan karakteron de la elformiĝinta prononca normo.

(4) La kvara ĉapitro traktas pri la *objektiva fonetika esploro* (spektra kaj oscilografaj) de tri fonemoj de la norma prononco en Esperanto. La vokaloj /a/ kaj /o/ estis elektitaj por analizi la situacion rilate al la redukto de vokaloj en Esperanto. Lingvoj kun dinamika akcento havas redukton de senakcentaj vokaloj, kio havas naturajn artikulaciajn kialojn (tio interesas kaj pro akĉentoj el gepatraj lingvoj, ofte ligitaj kun redukto, kaj pro moderna parola stilo de Esperanto, kie tiu artikulacia tendenco devas roli). Tamen en Esperanto jam Zamenhof malpermesis pozician variadon, krome troviĝas klaraj malpermesoj de redukto ĉe liaj posteuloj (ekz. Wells). Esploro montris, ke en prononcaj variantoj kun altaj poentoj objektivite videblas kvanta redukto, kiun tamen la aŭskultantaro ne konscias – do ĝi estas percepte ne signifa. La apero de kvalita redukto gvidas al malaltigo de poento kaj estas komentata de la aŭskultantaro, do ĝi estas signifa kaj nenorma. La poenta listo de la parolantoj statistike korelacias kun la redukto de vokaloj en ilia elparolo: ju pli malgranda estas la redukto, des pli alta estas la poento. Tial ni povas diri, ke la sistemo de lingvo limigas artikulaciajn tendencojn. La konsonanto /r/, objekto de multaj pridiskutoj, estas interesa pro sia vasta variado en la komunumo. La esploro montris, ke altan pritakson meritas vibranta langopinta /r/ malgraŭ demokratieco de la komunumo, malgraŭ kelkaj eblecoj en la Fundamento,

malgraŭ uzo de aliaj variantoj fare de esperantistoj kun alta pozicio en la komunumo. Aliaj /r/ ricevas negativan pritakson, kaj eĉ ĉe langopinta /r/ ekzistas preferoj.

(5) La ĉefaj konstatoj estas jenaj:

5.1 Esperanto similas al naturaj etnaj lingvoj dank al sia nuntempa stato, kaj tion indikas ankaŭ la parte plana, parte spontanea elformiĝo de la prononca normo.

5.2 Esperanto havas prononcan normon: ĝi ekzistas en la lingva konscio de la komunumo; ĝi estas ligita al certa grupo de parolantoj; ĝi havas certajn fonetikajn karakterizojn (superetnolektan karakteron).

5.3 Kelkaj kriterioj de la norma prononco en Esperanto samas kun naciaj lingvoj: la norma prononco estas superetnolekta, ĝi funkcias kiel unuigilo, transdonas tradicion, funkcias estetike kaj estas pritaksata kiel korekta. La specifeco de la esperanta norma prononcvarianto aperas en pritaksoj: ekzemple, ne tipas por nacia lingvo la pritaksoj „komprenebla“ kaj „natura“. En la socia sfero ne rolas sociaj trajtoj, kutimaj por nacia lingvo. Rolas la kvalito de la lingvoposedo kaj la aktiveco en la komunumo. En internacia lingvo kompare al nacia pli gravas la klareco de la fonemoj en parolfluo, do fonetikaj apartaĵoj, ol la socia signifo, kiu tre gravas en nacia lingvo.

5.4 La moderna prononca normo en Esperanto estas “severa”, ĝi sekvas la tendencon minimaligi la variadon, eblan en la internacia lingvo. Tio estas ligita kun forta lingva konscio, strebo al idealo, konsiderante ke lingvo funkcias kiel bazo por la komunumo kaj estas baza valoro.

5.5 La norma varianto formiĝis surbaze de buŝa lingvouzado, tipa por moderna periodo, surbaze de la Fundamento kaj ties konscia kultivado, kaj surbaze de “popola lingva politiko” en la komunumo. La elformiĝo de la norma varianto estas ligita kun konverĝaj strategioj en la komunikado.

3.2.2 Biografia Informo pri *Oksana Burkina*

Oksana Viktorovna Burkina naskiĝis en 1979 en Sovetunio, Kazahio, Issyk. Komence de 90-aj jaroj ŝi translokiĝis al Rusio kaj en 2000 finis la Barnaulan Pedagogian Universitaton, la fakultaton de fremdaj lingvoj, kie ŝi specialiĝis pri instruado de la lingvoj germana kaj angla. La doktora laboro estis plenumita ĉe la Sankt-Peterburga Ŝtata Universitato, fakultato de filologio kaj artoj, katedro pri ĝenerala lingvistiko, kie ŝi enkondukis kurson pri moderna Esperanto. La materialoj de la disertacio estas prezentitaj ĉe pli ol 10 konferencoj.

3.2.3 Publicaĵoj de *Oksana Burkina*

1. Буркина О. В. Гласные в эсперанто: между запретом на редукцию и законами устной речи [Текст] / О. В. Буркина // Известия РГПУ им. А.И. Герцена. Аспирантские тетради. № 34 (74), часть 1. – СПб., 2008. – С. 80-89. (Vokaloj en Esperanto: inter malpermeso de redukto kaj leĝoj de buŝa parolo).

2. Буркина О. В. Международный язык и его произношение (на материале английского и эсперанто) [Текст] / О. В. Буркина // Электронный вестник ФППК. – 2007, выпуск 4. (Internacia lingvo kaj ties prononco).

3. Буркина О. В. Носитель нормативного произношения в эсперанто (по данным опроса) [Текст] / О. В. Буркина // Материалы XXXIII Международной филологической конференции. Вып. 24, секция "Общее языкознание", ч.4. – СПб., 2004. – С. 21-31. (Portanto de norma prononco en Esperanto).
4. Буркина О. В. Особенности языковой эсперанто-общности [Текст] / О. В. Буркина // Социальные варианты языка – III. Материалы международной научной конференции 22-23 апреля 2004 года. – Нижний Новгород, 2004. – С. 210-213. (Specifeco de esperantista lingvo-komunumo).
5. Буркина О.В. Соотношение системы и нормы в эсперанто (на примере фонетической системы) [Текст] / О. В. Буркина // Вестник ВятГГУ. № 1(2). – Киров, 2008. – С. 53-56. (Interrilato de sistemo kaj normo en Esperanto, sur ekzemplo de fonetika sistemo).
6. Буркина О. В. Языковые оценки в эсперанто [Текст] / О. В. Буркина // Известия РГПУ им. А.И. Герцена. Аспирантские тетради. № 35 (76), часть 1. – СПб., 2008. – С. 76-84. (Lingvaj pritaksoj en Esperanto).
7. Буркина О.В. Проблема источников в эсперантологических исследованиях // Современные методы исследования в гуманитарных науках. Материалы научной конференции студентов, аспирантов и молодых ученых 16-17 декабря 2008. Санкт-Петербург, 2008. (Problemoj de fontoj en esperantologia esploroj).
8. Bourkina O. Rimarkoj pri la prononca normo de Esperanto [Текст] / O. Bourkina // En: Blanke, Detlev (2005, red.): Lingvaj kaj historiaj analizoj: aktoj de la 28-a Esperantologia Konferenco en la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, Vilno, 2005. – Rotterdam: universala Esperanto-Asocio, 2007. – p. 7-12.
9. Bourkina⁶ O. Soziolinguistische Parameter der modernen Normaussprache des Esperanto [Текст] / O. Bourkina // En: Blanke, Detlev (2005, red.): Internationale Plansprachen – Entwicklung und Vergleich: Beiträge der 14. Jahrestagung der GIL e.V. Interlinguistische Informationen. Beiheft 12. – Berlin: GIL, p. 78-84.

3.3 Doktoriga disertacio de *Andreas Kück* pri kvantaj studoj lige al Esperanto

La 23-an de aprilo 2009 la diplom-fizikisto Andreas Kück doktoriĝis pri lingvistiko ĉe la Universitato Trier (Germanio) per jena esperantologia disertacio:

Kück, Andreas (2009): Quantitative Studien zum Esperanto unter besonderer Berücksichtigung der Wortbekanntheit. Trier: Universität Trier, Fachbereich II (Sprach-, Literatur- und Medienwissenschaften, 212 p..

La disertacio aperis en cifereca formo ĉe: <http://ubt.opus.hbz-nrw.de/volltexte/2009/525/> (30.8. 2009)

3.3.1 Resumo de la disertacio

La disertacio enhavas kvantajn studojn pri Esperanto rilate al elektitaj problemoj el jenaj kampoj: parolsonoj, vorteroj, frazoj kaj vortoj, vortofteco kaj – kiel fokuso – vortkonateco.

⁶ Ni trovas la skribmanierojn ‚Burkina‘ kaj ‚Bourkina‘.

Ĉefaj rezultoj:

La parolson-ofteco-distribuo de Esperanto povas esti priskribata precipe bone per la Yule-modelo; okaze de du-paroloneca konsidero de la ekfrotaj parolonoj rezultas iomete pli malbona adaptiĝo, ol okaze de unu-paroloneca konsidero.

Aplikado de la klasifika ŝlosilo de Altmann kaj Lehfeldt konfirmas la opinion de la plej multaj aŭtoroj, laŭ kiu Esperanto estas lingvo algluema (aglutina-Red.) kun kelkaj trajtoj de izola lingvo. La leĝo pri interrilatoj inter vortlongo kaj plursignifeco, trovita ĉe aliaj lingvoj, validas ankaŭ por Esperanto.

Por la ekzamenado de la interrilato inter vortkonateco kaj vortofteco kaj krome por la ekzamenado de la memtakso de la propra Esperanto-aplikopovo fare de ĝiaj parolantoj estis detale prezentita kaj proponita, kiel nov-idea opcio ankaŭ por la ekzamenado de analogaj problemoj, la metodo de logistika regresio (inkluzive de statistika fidindeco).

Pri la sekve priskribataj ĉefhipotezoj oni atentu, ke ĉefhipotezoj (a) kaj (b) validas nur por tiaj Esperanto-parolantoj, kiuj taksas sian Esperanto-aplikopovon kiel sufiĉe bonan; ĉefhipotezo (c) validas ankaŭ por tiaj Esperanto-parolantoj, kiuj taksas sian Esperanto-aplikopovon kiel ne sufiĉe bonan. Konsiderante ĉion surbaze de la esplorado oni povas diri jenon:

(a) La ofteco de la fidine konataj vortoj respondas al la oftecogrupoj 7 el naŭ oftecogrupoj de la statistiko evoluigita de la Akademio de Esperanto („Baza Radikaro Oficiala“, BRO; oftecogrupoj 1: plej oftaj vortoj).

(b) Estu A la ofteco de Esperanto-vortoj fidine konataj al homoj de gepatra lingvo el la latinida aŭ ĝermana lingvo-subfamilio. Estu B la ofteco de Esperanto-vortoj fidine konataj al homoj de gepatra lingvo ĉina, japana aŭ el la finn-ugra lingvo-subfamilio. La ekzamenado montris: Inter A kaj B ne estas signifa diferenco. Jena evidenta konjekto ne estis konfirmata de la empiria ekzamenado, nome ke Esperanto-parolantoj de gepatra lingvo el la latinida aŭ ĝermana lingvo-subfamilio (= fonto de la plej multaj Esperanto-vortoj) havas avantaĝon kaj en komparo konas pli maloftajn Esperanto-vortojn, ol ĉi tiajn konas Esperantoparolantoj de aliaj gepatraj lingvoj.

(c) Ĉe statistika fidindeco de 95% la memtakso de la propra Esperanto-aplikopovo fare de ĝiaj parolantoj estas eĉ post 100 jaroj da lernado nur 73%. Lernodaŭro por fidinda aplikopovo (do 90% ĉe 95% da statistika fidindeco) ne povis esti determinata.

3.3.2 Biografiaj informoj pri *Andreas Kück*

Andreas Kück (*1963, Bremerhaven/Germanio) diplomiĝis pri fiziko ĉe la Universitato Hamburg (1988). Li laboras kiel evoluiganto de kontrolteknikiloj en la kampo de aviadila konstruado (ak631@gmx.net).

3.3.3 Publicaĵoj de *Andreas Kück*

"Oficialaj lingvoelementoj de Esperanto (OLEO)". Rechtenfleth: Aŭtoro, 2008, 54 p.
<http://www.akueck.de/oleo.htm>

"Takso de la porcio de 'tre internaciaj vortoj' en la tutaĵo de vortoj fremdaj en la senco de Regulo 15" (2009) <http://www.ipernity.com/blog/55667/120693>

"Vortoj fremdaj kaj novaj vortoj ĉe Ĉina Radio Internacia" (2008)
<http://www.ipernity.com/blog/55667/114561>

"Tre internaciaj vortoj (TIV) - rezonado pri Regulo 15" (2008)
<http://www.ipernity.com/blog/55667/106431>

"Uzebleco de Regulo 15: konsiletoj por la ekzamenado de precipe orientaciaj lingvoj" (2009)
<http://www.ipernity.com/blog/55667/152584>

3.4 Magistraj kaj diplomaj disertacioj

3.4.1 Benedikt Poller pri la kultura fono de Esperanto

Fine de 2008 *Benedikt Poller* defendis sian magistran disertacion. Kadre de la 18-a GIL-Konferenco 2008 (viu IpI 67, p. 14-15) li havis la eblecon diskutigi sian laboraĵon antaŭ kritikaj fakuloj.

Jen la laboraĵo:

Poller, Benedikt (2008): Zur Rolle von Plansprachen in der internationalen Kommunikation. Die Kulturgebundenheit des Esperanto - eine soziolinguistische Untersuchung. München: Ludwig-Maximilian Universität, Institut für Deutsch als Fremdsprache. Fakultät 13 – Department II, Kommunikation und Sprachen. (Expertizantoj: prof. d-ro J. Roche, prof. d-ro W. van Peer), 103 p. + 38 p. aldonajo.

(Pri la rolo de planlingvoj en la internacia komunikado. La kultura ligiteco de Esperanto – sociolingvistika esploro).

3.4.2 Alberto Emerson Werneck Dias pri neologismoj

La brazilano defendis jenan *Master*⁷-disertacion:

Werneck Dias, Alberto Emerson (2007): Renovação lexical do esperanto: mecanismos de formação de neologismos. Brasília: Universidade de Brasília, 217 p.

La teksto, plena de materialo pri la problemo de neologismoj en Esperanto, troviĝas ĉe:
http://bdt.d.bce.unb.br/tesdesimplificado/tdc_busca/arquivo.php?codArquivo=2304

3.4.3 Danijela Drakula pri sociologiaj aspektoj de la Esperanto-komunumo

Bedaŭrinde nur nun ni eksciis pri jena diplomlaboraĵo (danke al Nikola Rašić):

Drakula, Danijela (2003): Primjena teorije razložite akcije u predikciji zalagnja za Esperanto. Diplomski rad. Zagreb: Sveučilište u Zagrebu, Filozofski Fakultet, Odsjek za Psihologiju. Mentor: doc.dr.sc. Željka Kamenov, 91 p.

⁷ La titolo „Master“ estas usona varianto por la eŭropa „Magister“, ĝenerale samvalora akademia grado al „diplomo“, kutime ricevata post 5-jara universitata studado.

(Apliko de la teorio de racia agado al prediktado (=prognozo?Red.) de engaĝiĝo por Esperanto. Departamento pri psikologio, Filiozofia fakultato, Universitato Zagrebo.)

La disertacio troviĝas ĉe <http://darhiv.ffzg.hr/31/01/DanijelaDrakula.pdf> (31.8.2009)

3.5 Bakalaŭraj⁸ disertacioj

3.5.1 Katarína Noskova kontraste pri valento

Nosková, Katarína (2009): Valenzmodell des Verbs aus kontrastiver Sicht in der deutschen, slowakischen Sprache und im Esperanto. Bakalárska práca. Trnava: Univerzita sv. Cyrila a Metoda v Trnave, Filozofická Fakulta, Katedra Germanistiky. Mentoro: Prof. PhDr, Ružena Kozmová, CSc., 207 p. (La universitato troviĝas en Slovakio-Red.)

(Valenta modelo de la verbo en la germana kaj slovakaj lingvoj kaj en Esperanto, laŭ kontrastlingvistika vidpunkto.)

3.5.2 Marek Blahuš pri ortografia kontrolo de Esperanto

Blahuš, Marek (2008): A Spell Checker for Esperanto. Bachelor Thesis. Brno Masaryk Universitato, Fakultato pri Informadiko. Mentoro: RNDr. Petra Stojka, PhD., 40 p.

Resumo:

Tiu ĉi disertaĵo donas koncizan trarigardon de literumkontrola programaro kaj priskribas la procezon de konstruado de literumkontrolilo por la lingvo Esperanto kaj ties implementon forme de vortaro (t.e. afiksa dosiero kaj vortlisto) por la literumkontrolilo Hunspell. La vortlisto estas adaptaĵo de vortradikoj venantaj de la renoma Esperanto-vortaro PIV.

Rekono de morfologie kompleksaj vortoj, kiuj estas oftaj en Esperanto pro ties aglutina ĥaraktero, estas ebla pro la afiksa dosiero kiu konstruiĝis surbaze de preta morfemstrukturigo de vortderivaĵoj aperantaj en la sama fonto.

Reguloj ekestintaj en tiu procezo estas plibonigitaj per semantika klasado de ĉiuj engaĝitaj radikoj, por kio kreiĝis sistemo bazita sur tekstara analizo kaj kelkaj fakvortaroj, kombine kun scioj pri akceptemo de ĉiu afikso al radikoj el diversaj semantikaj klasoj, akiritaj de la gramatika manlibro PMEG. La rezultinta literumkontrolilo estas funkcia koncept-pruvo, plibonigota kaj integrota en la gramatikkontrolilan projekton de la organizo E@I.

Vidu ankaŭ:

http://is.muni.cz/dok/rfmgr.pl?furl=%2Fth%2F172464%2Ffi_b%2F;info=1;lang=en
(31.8.09).

⁸ La titolo ‚bakalaŭro‘ (angle *bachelor*), laŭ usona modelo, estas la plej malalta akademia grado, kutime ricevata post 6-semestra universitata studado. Lige al la eŭropunia studreformo („procezo de Bologna“) tiu ĉi grado estas atingiata pli kaj pli ofte. Post la ricevo de tiu ĉi grado eblas daŭrigi la studadon por akiri la titolon de ‚Master‘ aŭ ‚Magistro‘.

3.6 Diplomalaborajoj el Poznano (*Bavant, Brosch, Vogt*)

Kiel ofte raportite sur la paĝoj de IpI, en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, sub gvido de *d-rino habil. Ilona Koutny*, jam dekon da jaroj eblas studi interlingvistikon en la kadro de internaciaj kursoj. Kelkaj studentoj lastatempe defendis interesajn studofinajn laboraĵojn:

Bavant, Marc (2008): La viva genro preter akordo. Interagoj de semantiko kun sintaksa rolmarkado. 62 p.

Brosch, Cyril (2008): Vortfarado el la vidpunktoj de la hindeŭropista lingvoscienco kaj de esperantologio. 49 p.

Vogt, Horst (2008): Komunikad-problemoj en la institucioj kaj en la membroŝtatoj de Eŭropa Unio – ĉu teorie kaj politike solveblaj? 57 p.

3.7 Fino de la Esperanto-fako en la ELTE-Universitato Budapest

La mondfama Esperanto-fako ĉe la ĉefa Budapeŝta universitato ELTE malaperos. Ekde la jaro 1966 ĉe la Katedro de Ĝenerala kaj Aplikata Lingvistiko de la Budapeŝta universitato ELTE (Eötvös-Loránd-Universitato) funkciis altnivela Esperanto-fako. Esperanton oni povis studi ne kiel ĉeffakon, sed kiel la unuan kromfakon. Jam antaŭ kelkaj jaroj oni ĉesis akcepti studentojn, kaj la lastaj du nun okupiĝas pri siaj diplomalaborajoj. La usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF) faris provon savi la Esperanto-fakon, proponante financan subtenon, sed la internaj konfliktoj de la hungaria Esperanto-movado malebligis konstruan aliron.

Iniciatinto kaj ĉefa motoro de la Esperanto-fako ekde 1966 ĝis sia morto en 1987 estis István Szerdahelyi⁹. En la Budapeŝta Esperanto-fako studis multaj konataj Esperanto-aktivuloj hungariaj sed ankaŭ alilandaj.

Post la falo de komunismo en Hungario falis ankaŭ la prestiĝo de Esperanto kaj la ĝenerala interesiĝo pri ĝi. Samtempe la financado de la universitato estis striktigita, kaj antaŭ kelkaj jaroj la akceptado de novaj studentoj por la Esperanto-fako estis ĉesigita.

Dum kelkaj jaroj la nombro de studentoj en ELTE trioniĝis al malpli ol 10.000, kaj por ŝpari monon oni decidis devige pensiigi preskaŭ ĉiujn instruistojn pli ol 62-jarajn. Inter tiuj estis ankaŭ lekciisto de la Esperanto-fako, Iván Bujdosó, kiu iĝis 62-jara en la jaro 2006. Lia maldungo signifis ankaŭ, ke la universitato rezignis pri la planoj transformi la malnovan, universitatnivelan Esperanto-fakon en novan, malpli ampleksan lingvoinstruistan programon, kiu tamen ebligis al la studentoj ankaŭ estonte havi kursojn pri Esperanto kiel parton de sia universitata eduko. Ĉar la oficiala kialo por la maldungo de la lekciisto estis manko de financado, la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation serioze konsideris la eblecon kontribui al la salajrokostoj por konservi la Esperanto-programon ĉe la universitato.

La sekcio de aplikata lingvistiko pozitive sintenis al la propono pri financa subteno, kaj printempe de la jaro 2007 Humphrey Tonkin kiel reprezentanto de Esperantic Studies Foundation persone vizitis la universitaton por diskuti la praktikajn detalojn. Tamen la dekano de la katedro tute rifuzis renkonti lin, kaj la rektoro de la universitato ne konsentis subskribi kontrakton pri la financa subteno.

⁹ Vidu en ĉi tiu kajero la raporton pri la kolokvo omaĝe al Szerdahelyi dum la 96-a UK, p. 3, kaj pri la libro, redaktita de Ilona Koutny, p. 34-36.

En la sama periodo kulminis la interna skismo de la Esperanto-movado en Hungario. La nova prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, György Nanovfszky, denunciis la antaŭan afergvidanton László Szilvási ĉe la polico pro asertataj financaj misagoj, kaj la tuta hungaria movado disfalis en du batalantaj frakcioj.

La skismo evidente influis la etoson de la vizito de Humphrey Tonkin, ĉar unu el la tri instruistoj de la Esperanto-fako eĉ ne partoprenis la kunvenojn. Sendube la skismo ankaŭ malaltigis la jam nealtan prestiĝon de Esperanto ankaŭ en la okuloj de la universitata estraro, kaj do nerekte kontribuis al la fina malapero de Esperanto el la programo. Intertempe la polica esplorado estis finita, financaj misagoj ne estis trovitaj, kaj la nova estraro de Hungaria Esperanto-Asocio publike pardonpetis al la senkulpe akuzita eksa estro. Tamen la skismo ne malaperis, kaj el la iam elstara Esperanto-fako de la Budapeŝta universitato restas nur du studentoj.

„La trista fakto estas, ke ni estas la lastaj studentoj, ĉar la "kara" dekano decidis, ke la fako ĉesu la funkciadon. Verdire ni ofte sentas, ke ni estas superflujaj malgravaĵoj en la okuloj de la universitata burokratio“, skribis unu el la studentoj lastatempe en diskutlisto de hungariaj esperantistoj.

(Laŭ Libera Folio:

<http://www.liberafolio.org/2009/esperanto-malaperas-el-budapesta-universitato/?searchterm=Esperanto-Fako> , 31.8.2009).

3.8 Amsterdamo: Wim Jansen oficiale nomumita profesoro

Laŭ informo de la rektoro prof. d-ro D.C. van den Boom la 4-an de septembro 2009 en la Universitato de Amsterdam d-ro Wim Jansen prezentis publikan fakan festparoladon (“Esperanto – lingvo aminda”, mendebla ĉe la aŭtoro en Esperanta traduko) kaj estis oficiale nomumita “speciala profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto” (wimjansen@casema.nl).

3.9 Amsterdamo: Eksperimenta lingvistika kurso

La Universitato de Amsterdamo aparte engaĝos Wim Jansen (kiu estas speciala profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto nome de Internacia Esperanto-Instituto, IEI) por krei novan eksperimentan kurson en la humanisma fakultato sub la titolo 'Lingvoj en kontakto - Lingvoj en konflikto'. Jansen kunordigos la taskon por kvar aliaj docentoj kaj respondecos mem pri duono de la lekcionoj kaj pri unu el kvar seminarioj ene de la kurso. La kurso traktos la ĝeneralan fenomenon de multlingveco en socio, de interlingvaj influoj kaj de lingva politiko. Enkonduke en la lekcionoj kaj specife en la seminarioj estos traktataj konkretaj kazoj de dominado, subpremado kaj sociaj interfrotiĝoj kaŭze de multlingveco. Kvankam la nova kurso ne havos rektan rilaton, nek enhave nek administre, kun la instruado, kiu jam de kelkaj jaroj okazas sub la respondeco de la katedro pri interlingvistiko kaj Esperanto, estas klare, ke spirite kaj teme ĝi randos al tiu ĉi lasta kaj ke la flanka enplekto de la planlingva koncepto estos preskaŭ neevitebla.

4 Dalibor Brozović (Sarajevo 28.07. 1927- Zagreb 18.06.2009)

4.1 Omaĝo

Nikola Rašić

En sia Zagreba hejmo forpasis unu el la plej grandaj kroataj lingvistoj, kaj cetere unu el la plej gravaj figuroj de la moderna kroata kulturo kaj socia vivo. Li estis prezidanto de Kroata

Esperanto-Ligo ekde ĝia fondiĝo kiel memstara landa asocio ĝis la destino forprenis lin el niaj vicoj. Pro liaj meritoj por la Esperanto-movado UEA elektis lin kiel membron de la Honora Patrona Komitato, institucio rezervita nur por la movadaj senmortuloj. Kaj al Esperanto Brozović apartenis senkondiĉe kaj plene.

Kiel fama kaj eble la plej influa lingvisto en Kroatio kaj Bosnio li preterlasis neniun okazon por esprimi sian apartenon al la Movado kaj subtenon al ĝiaj ideoj. Liaj gravo kaj postlasaĵo estas fakte nemezureblaj. Grandparte estas lia merito ke en lia lando Esperanto estas prenata kiel serioza kaj valora afero. Des pli ke nia samideano Dalibor ankaŭ estis parlamentano kaj dum certa periodo eĉ vicprezidento de Respubliko Kroatio. Sed ĉiam li estis klare kaj sencede: la esperantisto.

Li estis membro de Kroatia Akademio de Sciencoj kaj Artoj, sed same membro de La Makedona Akademio kaj de Academia Europaea. Interalie li ankaŭ prezidantis en la Kroata-Bulgara Societo. Lia graveco transiras la limojn de la propraj lando kaj kulturo, ĉar li lasis egale fortajn spurojn ankaŭ en la kulturoj de bulgaroj, makedonoj, slovenoj, rusoj kaj aliaj slavaj popoloj. Estas preskaŭ neniu slava idiomo, pri kiu li ne okupiĝis kiel sciencisto.

Li verkis en la gepatra kroata, en la avina bulgara, sed ankaŭ en la adoptaj lingvoj kiel la rusa kaj la makedona. En Esperanto li verkis sciencajn verkojn, sed ankaŭ rimarkindan poezion, per kiu li eniris kelkajn antologiojn. Multe kaj fajnstile li tradukis al Esperanto el la kroata kaj makedona. Tri siajn verkojn pri makedonaj temoj Brozović verkis originale en Esperanto.

Unu el ili, fama postparolo al la Esperanto-lingva eldono de la libro „Por la makedona lingvo“ (tradukis Nikola Rašić), apartenas al liaj plej brilaj verkoj, kaj ĝi poste tradukiĝis ankaŭ al la kroata kaj makedona. Malofte okazas, ke la plej grava referenclingvo estas Esperanto, des pli se temas pri tute lokaj temoj. Nu, la gravo de tiu artikolo lia multe pli vastas ol la limoj de ties temo. La plej grava kontribuo lia estis la libro Standardni jezik (Normlingvo, 1970), mejloŝtono de la kroata normlingvistiko, sed ankaŭ unu el la plej gravaj teoriaj studoj pri la fenomeno de normlingvoj ĝenerale, kaj en la slava mondo precipe.

Esperantologie plej gravas liaj meritoj pri la lingvotipologia pozicio de Esperanto. En sia verko „Pozicio de Esperanto en lingva tipologio“ Brozović en science ekzakta maniero konfirmas la tezon pri la aglutina karaktero de la morfologia strukturo de Esperanto kaj difinas ĝian pozicion rilate aliajn lingvotipojn (situigante ĝin inter la aglutinaj kaj fleksiaj/fandaj lingvoj). En tiu ĉi verko li ankaŭ prezentas sian tre pensigan ideon pri la t.n. duonafiksoj en Esperanto kiel fanda/fuzia elemento, kio sendube estas la plej interesa parto de tiu ĉi verko.

En sia artikolo „Pri la slavaj elementoj en Esperanto“ li montras ke la slavaj elementoj estas pli ampleksaj ol oni kutime emas pensi. Ili manifestiĝas je diversaj niveloj: grafisma kaj fonologia (grave), leksika (malpli grave), sintaksa kaj semantika (tre funde). Slav-baltaj modeloj signife rekoneblas ankaŭ je iuj morfologiaj kaj morfosintaksaj solvoj en Esperanto; ekzemple en la konstruo de la sistemo de la t.n. korelativoj kaj serio de aktivaj kaj pasivaj participoj. Samtiel, iuj vortfaraj afiksoj kaj vortfaraj modeloj estas sendube slavdevenaj, kaj esence slavaj estas diversaj gravaj gramatikaj konceptoj (ekz. la verba aspekto) kiuj grave influas la “lingvan spiriton” de Esperanto. En sia verko „Zamenhof kaj la litova lingvo“ li okupiĝas pri eventualaj litovaj influoj en la estiĝo de Esperanto, kiu ja restas malferma kaj diskutata temo en esperantologio.

Gravas mencii ke Brozović lernis la litovan pere de Esperanto, kaj poste li estis la plej granda kroata aŭtoritato pri litovaj temoj. En siaj du interlingvistikaj verkoj Brozović analizas la rolon de du slavoj, Baudouin de Courtenay kaj Juraj Križanić. La unuan oni povas konsideri pioniro de interlingvistiko kiel branĉo scienca, dum la dua estas unu el la unuaj praktikaj interlingvistoj inter slavoj (Brozović lokas lin inter Komenio kaj Lejbnico) kaj unu el la unuaj aŭtoroj de aposterioraj interlingvistikaj projektoj (en tiu ĉi kazo: interslava lingvo).

La esperantologiaj kaj interlingvistikaj intereso de Dalibor Brozović ne estas io izolita sed kongruas kun la tuto de lia scienca verkaro, ene de kiu apartan lokon okupas lingvoplanado kaj lingvopolitiko, kaj kongruas ankaŭ kun la tuto de lia mondkoncepto. En sia nacia kulturo li okupis centran lokon kiel teoriisto de lingvoplanado kaj lingva politiko, kaj same esence li kontribuis al la establiĝo de la plej juna slava lingvo, la makedona, kiun li sekvis kaj flegis ekde ĝia naskiĝo kiel lingvo.

Li kredis ke ĉiu popolo, eĉ la plej eta kaj la plej senpova, rajtas disponi pri propra lingvo. Sed li ankaŭ bone sciis, ke nacioj kaj popoloj ne vivas en izolo, ili ankaŭ devas esti akceptitaj kiel plenrajtaj membroj de la internacia komunumo de popoloj, kun siaj lingvaj rajtoj inkluzive. La sola protektilo de tiuj rajtoj kaj perspektivoj de malgrandaj popoloj estas la neŭtrala internacia lingvo Esperanto - kaj tion li emfazis en sennombraj okazoj. Kaj kiam li diris ion tian, lia juĝo havis la pezon de fina aŭtoritato pri tiuj demandoj. Li verkis kroatlingvajn artikolojn pri lingvopolitikaj temoj kaj emfazis sian esperantistecon en ĉiuj oficialaj biografioj kaj prezentoj.

Ni ĉiuj perdis multe, la kroata popolo kaj la esperantistoj, ne nur kroataj. Forpasis nia samideano, unu el la veraj kaj nemalhaveblaj.

Lia personeco kaj vivoverko estas gigantaj, li ja estis monumenta aĉaĵo en la historio de la kroata popolo. Sed en niaj verdaj rondoj li estis ĉiam simpatia samideano, unu el egaluloj. Simpla kaj alirebla, varma kaj plene homa Dalja. Jes, ja... homo forpasis... sed kia!

(El: Libera Folio: <http://www.liberafolio.org/2009/akademiano-dalibor-brozovic-forpasis/> 27.6.09)

Notoj de la redaktoro:

Nikola Rašić mencias en sia nekrologo diversajn studojn de la forpasinto. Mi atentigas, ke en IpI 2/2009 (69), p. 25-28, ankaŭ aperis omaĝo de Rašić okaze de la 80-jariĝo de Brozović, krom tio elekta bibliografio de verkoj de la forpasinto (esperantoloiaj kaj interlingvistikaj verkoj, makedonaj temoj en Esperanto, originala poezio en Esperanto kaj tradukoj).

Per retmesaĝo de 22.6.09, Nikola Rašić skribis al mi:

„Mi ĵus telefonis al la edzino de Brozović. Ŝi rakontis al mi belan aferon. La tagon antaŭ la morto alvenis la resumo de mia studo en IpI, sendita de Detlev (dankon Detlev!). Ŝi legis tion al li apud la lito. Li tre ĝojis, ke tio aperis, kaj endormiĝis. Tio estis la lasta legaĵo de li. En Esperanto, do.

Kortuŝe, ĉu ne?

Nikola“

4.2 La festlibra artikolaro

Intertempe aperis la longe anoncita festlibro omaĝe al Dalibor Brozović, kiel parto de jena verko:

Zadarski filološki dani II. Zbornik radova [Eldonis:] *Sveučilište u Zadru / Odjel za kroatistiku i slavistiku Zadar 2009, 534 p.* (La filologiaj tagoj de Zadar II. Kolekto de artikoloj. Eldonis: Universitato de Zadar. Departemento pri kroatistiko kaj slavistiko).

Parto III: Znanstveni rad akademika Dalibora Brozovića.

(Scienca laboro de akademiano Dalibor Brozović), p. 333-534:

Ni donas la kompletan liston de la kontribuoj, kiu prilumas la ĉefajn aktivadkampojn de la forpasinto:

- Josip Lisac* Dalibor Brozović - profesor i znanstvenik. U povodu 80. obljetnice života (Dalibor Brozović – profesoro kaj sciencisto. Okaze de la 80-a vivjubileo)
- Stjepan Damjanović* Brozovićeve paleoslavističke teme (Paleoslavistikaj temoj de Brozović)
- Vojislav P. Nikčević* Naučni pogledi Dalibora Brozovića na crnogorski jezik. (Sciencaj vidpunktoj de Dalibor Brozović rilate al la montenegra lingvo)
- Adnan Ćirgić* Crnogorska subvarijanta srpskoga jezika u interpretaciji Dalibora Brozovića (Montenegra subvarianto de la serba lingvo interpretita de Dalibor Brozović)
- Mijo Lončarić i Anita Celinić* Brozović o kajkavštini (Brozović pri la kajkava dialekto)
- Stjepan Babić* Brozovićeve borba za normiranje i priznavanje hrvatskih naglasaka. (Luktado de Brozović por normigo kaj agnosko de kroataj akĉentoj)
- Mile Mamić* "Jat" kao pravopisno, pravogovorno i didaktičko pitanje i Brozovićev prinos njegovu rješavanju (La sono “jat” kiel ortografia, ortoepia kaj didaktika problemoj kaj kontribuo de Brozović al ties solvado)
- Anita Runjić-Stoilova i Marijana Tomelić Ćurlin* Gube li se dentali ispred afrikata? Rasprava o jednom starom pravopisnom problemu (Ĉu dentaloj malaperas antaŭ afrikatoj? Diskuto pri malnova ortografia problemoj)
- Loretana Despot* Hrvatski jezik i jezikoslovlje u Slavoniji u 18. stoljeću (Kroata lingvo kaj lingvoscienco en Slavonio en la 18-a jarcento)
- Sanja Holjevac* Hrvatska književnojezična povijest u djelu akademika Dalibora Brozovića (Historio de la kroata lingvo en la verkaro de akademiano Dalibor Brozović)
- Ilija Protuđer* Dalibor Brozović-jezični savjetodavac (Dalibor Brozović – lingva konsilanto)

Nikola Rašić

Lingvist na posebnu zadatku: Dalibor Brozović kao interlingvist, esperantolog i esperantist (Lingvisto ĉe speciala tasko: Dalibor Brozović kiel interlingvisto, esperantologo kaj esperantisto)

Ivan Bošković

Dalibor Brozović kao književni kritičar (Dalibor Brozović kiel literaturkritikisto)

5 Tanaka Katsuhiko – 75-jara¹⁰

La japana socilingvisto kaj mongolisto TANAKA Katsuhiko festis ĉijare sian 75-an naskiĝtagon. Li naskiĝis la 3-an de junio 1934. Li studis lingvistikon kaj mongolistikon en Tokia Universitato por Fremdlandaj Studoj kaj en Hitotsubashi Universitato. De 1964 ĝis 1966 li studis lingvistikon, folkloron kaj filologion ĉe Universitato de Bonn, ricevinte Humboldt-stipendion. Reveninte al Japanio, li instruis en Tokia Universitato por Fremdlandaj Studoj kaj en Okayama Universitato. Ekde 1976 li profesoris ĉe Hitotsubashi Universitato en Tokio ĝis pensiigo en 1998. Poste li daŭrigis instruadon kaj esploradon kiel profesoro ĉe Chukyo Universitato en Nagoya. Nun honora profesoro de Hitotsubashi Universitato, li daŭre energie verkas kaj prelegas.

Rilate al interlingvistiko/esperantologio substrekindas, ke li, unu el la plej konataj kaj multe legataj lingvistoj en Japanio, mencias Esperanton en preskaŭ ĉiuj siaj libroj pri lingvo. Liaj verkoj estas elstaraj ekzemploj, kiel Esperanto povas ludi heŭristikan kaj penselvokan rolon en socilingvistiko. En 2007, ĝuste antaŭ la Universala Kongreso en Jokohamo, li publikigis libron pri Esperanto en la prestiĝa eldonejo Iwanami Shoten (la enhavo estis prezentita en Ipl n-ro 69).

Listo de liaj ĉefaj (soci)lingvistikaj libroj en la japana lingvo (ĉiuj publikigitaj en Tokio):

(1975): Gengo no sisô – Kokka to minzoku no kotoba [Pensoj pri lingvo: Lingvo de ŝtatoj kaj popoloj], NHK-bukkusu [Japan Broadcast Publishing], 262p.

(1978): Gengo kara mita minzoku to kokka [Nacio kaj ŝtato en lingva perspektivo], Iwanami Shoten, 321p.

(1980): Kotoba no sabetsu [Lingva diskriminacio], Nôsongyosonbunkakyôkai, 254p.

(1981): Kotoba to kokka [Lingvo kaj ŝtato], Iwanami Shoten, 218p.

(1983): Hôtei ni tatsu gengo [Lingvoj en tribunalo], Kôbunsha, 315p.

(1983): Chomsky, Iwanami Shoten, 239p.

(1985): Gendai yôroppa no gengo [Lingvoj en nuntempa Eŭropo](kun Harald Haarmann), Iwanami Shoten, 208p.

(1989): Kokkago wo koete [Iri trans la ŝtatajn lingvojn], Chikumashobô, 285p.

(1993): Gengogaku towa nanika [Kio estas lingvistiko], Iwanami Shoten, 227p.

¹⁰ Ni petas pardonon pro la misa skribo de la antaŭnomo de prof. Tanaka en “Informilo por Interlingvistoj“ n-ro 2/2009 (69), p. 1 kaj 3.

- (1993): Kotoba no ekorojii [Lingva ekologio], Nôsongyosonbunkakyôkai, 242p.
- (1996): Namae to ningen [Nomo kaj homo], Iwanami Shoten, 204p.
- (1999): Kureôrugo to Nihongo [Kreolaj lingvoj kaj la japana], Iwanami Shoten, 229p.
- (2000): "Sutarin gengogaku" seidoku ["Marksismo kaj Lingvoscienco" de Stalin relegita], Iwanami Shoten, 293p.
- (2004): Kotoba towa nanika [Kio estas lingvo], Chikumashobô, 238p.
- (2007): Esuperanto – Itan no gengo [Esperanto: La lingvo hereza], Iwanami Shoten, 220p.
- (2008): Gengogaku ga kagayaite ita jidai [La tempo kiam lingvistiko brilis] (kun SUZUKI Takao), Iwanami Shoten, 270p.
- (La tekston kompilis KIMURA Goro, kun helpo de KITAGAWA Hisasi kaj Ulrich Lins.)

6 Toon Witkam – 65-jara. Persona bibliografio

La konata inĝeniero kaj specialisto pri komputa tradukado, la inventinto de la duonaŭtomata traduksistemo DLT, *Toon Witkam*, festos sian 65-an naskiĝtagon, la 7-an de oktobro 2009. Okaze de tiu vivo-jubileo ni publikigas la liston de liaj publikaĵoj.

Toon Witkam (1944) studis aeronautikon ĉe la Tehnika Universitato en Delft (Nederlando). Sekvis kariero en la softvar-industrio, de kiu li dediĉis la ĉefparton al perkomputila lingvistiko. Ĉe la Nederlanda firmao BSO en 1979 li iniciatis la esplorprojekton DLT (Distribuita Lingvo-Tradukado) por aŭtomata tradukado kun Esperanto kiel interlingvo. Dum la 1980-aj jaroj li gvidis tiun projekton, en kiu kunlaboris 10-15 lingvistoj kaj programistoj.

En 1990 li laboris kiel gast-esploristo ĉe ATR Interpreting Telephony Research Laboratories en Kioto. En 1991 li konsilis la Eŭropan Komisionon pri aŭtomata tradukado, kaj de 1992 ĝis 1996 li estis profesoro pri informadiko kaj kognativa ergonomio, denove en Delft. Ekde 2002, li okupiĝas pri vortstatistika analizo kaj aŭtomata erarkontrolo de Esperantaj tekstoj.

Listo de publikaĵoj

La publikaĵoj aperis sub la nomo "A.P.M. Witkam" aŭ "Toon Witkam"; krome, la artikoloj indikitaj per * (ĉefe recenzoj) estas aperintaj sub la pseŭdonimo "Tony Whitecomb".

- (1972): "Das interaktive grafische System des TR 440". En: ACM German Chapter (red.), *Fachtagung über grafische Programmiersprachen*, Erlangen, Germanio.
- (1973): "Optimizing Curve Segmentation in Computer Graphics". En: *International Computing Symposium*, A. Gunther et al. (red.). North Holland, Amsterdamo: 467-472.
- (1980): "Resolving Language Barriers in International Videotext Communication". En: *New Systems and Services in Telecommunications*, G. Cantraine, J. Destine (red.). North Holland, Amsterdamo: 143-153.

- (1981): “Esperanto kiel pontlingvo en komputilretoj – mankoj kaj rimedoj”. En: *Unua Simpozio pri Komputiko*, C. Bertin (red.), CCETT, Rennes (France), 42-53.
- (1981): “Natural Language Translation in Information Distribution networks”. En: *Networks from the users’ point of view (COMNET ’81)*, L. Csaba, T. Szentivanyi, K. Tarnay (red.), North-Holland, Amsterdamo.
- (1982): “An alternative strategy for steady growth towards high quality translation networks”. En: *Proceedings of the EURIM 5 Conference* En: P.J. Taylor, B. Cronin, B. (red.). ASLIB, Londono: 196-204.
- (1983): *Distributed Language Translation: Feasibility study of a multilingual facility for videotex information networks*. BSO, Utrecht, ISBN 90 70730 01 4 [enmeto en la interretbibliotekon www.scribd.com estas nun preparata], 370 p.
- (1985): “Distribuita Lingvo-Tradukado”. En: *Perkomputila tekstoprilaboro*, Ilona Koutny, (red.), Scienca Eldona Centro, Budapeŝto, 207-228.
- (1985): “DLT – Lancpintprojekto surbaze de Esperanto”. En: *Sciencaj komunikaĵoj*, n-ro 10, 37-43.
- (1986): Papegaaij, B.C.; V. Sadler, A.P.M. Witkam (red.): *Word Expert Semantics: an Interlingual Knowledge-Based Approach*. (DLT libroserio, 1). Foris, Dordrecht /Providence: 254 p.
- (1986): “Sciobankteknologio kaj la semantika mekanismo de DLT”. En: *XIVa Scienca Interlingvistika Simpozio*, Varsovio (28-30 aprilo).
- (1986): “Experiments with an MT-directed Lexical Knowledge Bank”. En: *Proceedings of the 11th International Conference on Computational Linguistics (COLING’86)*. Institut für angewandte Kommunikations- und Sprachforschung, Bonn, 432-434.
- (1986): “Moderne taalkunde-studie dient ook het high-tech belang”. En: *NRC Handelsblad*, Nederlando, 24 septembro, p. 9.
- (1986)* “EUROTRA goes public” (recenzo). En: *Language Monthly* (novembro), 20-21.
- (1987): “Interlingual MT – an industrial initiative”. En: *Machine Translation Summit*, Nagao, M. (prezidanto), Hakone (Japanio), 135-140.
- (1987)* “A Road Guide to MT Research” (recenzo). En: *Language Technology*, Nr. 2 (julio), p. 31.
- (1987)* “Machine Translation – a technology assessment” (recenzo). En: *Language Technology*, Nr. 3 (septembro), p. 31.
- (1988): Maxwell, Dan; Klaus Schubert, Toon Witkam (red.): *New Directions in Machine Translation* (DLT libroserio, 4). Foris, Dordrecht/Providence, 259 p.

- (1988): "DLT – an industrial R&D project for multilingual machine translation". En: *Proceedings of the 12th International Conference on Computational Linguistics (COLING'88)*. John von Neumann Society for Computing Sciences, Budapeŝto, 756-759.
- (1988): (kun Klaus Schubert) "Atingoj kaj perspektivoj de DLT", En: *der esperantist* [DDR], Nr. 1 (147), 14-18.
- (1988)* "Sensor Age" (recenzo) En: *Language Technology*, Nr. 9 (septembro), p. 44.
- (1988)* "MT needs fresh hormones" (recenzo). En: *Language Technology*, Nr. 10 (novembro), 45-46.
- (1989)* "CAT out of the bag" (recenzo). En: *Electric Word*, Nr. 13 (majo), p. 67.
- (1989): "The System Structure of DLT". En: *Seminar on Computer Based Natural Language Translation*, IBM Europe Institute, Garmisch-Partenkirchen (7-11 aŭgusto), Germanio.
- (1989): "Distributed Language Translation – new possibilities for East-West technological cooperation". En: *Reports on the 1st East-West Online Information Meeting*, Learned Information Ltd, Moskvo: 238-248.
- (1990)* "Machine Translation Looks East". *Electric Word*, Nr. 17 (januaro), p. 11.
- (1990)* Short review of Roger Penrose's "The Emperor's New Mind". En: *Electric Word*, Nr. 18 (marto), p. 60.
- (1990)* "Unravelling the infrastructure of a new technology" (recenzo). En: *Electric Word*, Nr. 20 (julio), p. 57.
- (1990): "ABMT for Text and Dialogue: a preliminary assessment of its potentials". ATR Interpreting Telephony Research Laboratories, Kioto, *Technical Report I-0165*, 41 p.
- (1991)* "Japan's chances in the great Machine Translation stakes". En: *Language Industry Monitor*, Nr.1 (januaro), 4-5.
- (1991): "Towards High-Precision MT" (recenzo). En: *Applied Computer Translation*, Vol. 1 Nr. 2 (majo), 35-44.
- (1991)* "MT research revitalized from the Hague?". En: *Language Industry Monitor*, Nr. 3 (majo), p. 6.
- (1991)* "Opening up EUROTRA: Trap or Treasure-house?" En: *Language Industry Monitor*, Nr. 5 (septembro), p. 5.
- (1992)* "Did Ovum get it right?" (recenzo). En: *Language Industry Monitor*, Nr.8 (marto), p. 10.
- (1992)* "Statistical methods gaining ground". En: *Language Industry Monitor*, Nr. 11 (septembro), 1-3.

- (1993): “Telematica Mèt en Zònder Mensen - Trends en Tegentrends”. Inaŭgura prelego, Faculteit Industrieel Ontwerpen, Technische Universiteit Delft, Nederlando (ISBN 90 6275 860 6), 19 marto, 24 p.
- (1997): “Hype, hoop en hypocrisie”. En: *Informer/NGI* (ten Hagen Stam), Hago, Vol. 1 Nr. 2 (temo-numero "Kennismanagement"), 3-4.
- (2004): “Daŭre traduki por finfine konvinki”. En: revuo *Esperanto*, n-ro 1167 (februaro), p. 29.
- (2004): “Bona tradukmaŝino baziĝas sur tradukmemoro”. En: revuo *Esperanto*, n-ro 1168 (marto), p. 56.
- (2004): “Favore al Diakritoj”. En: *La Gazeto* (ISSN 0299-6987), n-ro. 111 (marto), 18-19.
- (2004): “Esperanto kiel senpaga transdonilo”. En: revuo *Esperanto*, n-ro 1169 (aprilo), p. 80.
- (2004): “Tegen de spraakverwarring”. En: *Reformatorsch Dagblad*, Nederlando, 17 novembro, p. 19.
- (2005): “Nova vojo al aŭtomata tradukado”. En: *Internacia Kongresa Universitato, 58-a sesio, Vilno, Julio 23-30*, 83-98 (<http://www.uea.org/pdf/IKU2005.pdf>); ĝia angla traduko, “A new road to Automatic Translation”, troviĝas en <http://www.mt-archive.info/Witkam-2005.pdf>, 13 p.
- (2006): “History and Heritage of the DLT (Distributed Language Translation) project”. Propra publikaĵo, <http://www.mt-archive.info/Witkam-2006.pdf> 11 p.
- (2007): “La ekscito de vortstatistiko: Kiel krudforta kunmet-analizo kompletigas tekstkontrolo”. En: Detlev Blanke (red.): *Aktoj de la 28-a Esperantologia Konferenco en la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, Vilno 2005*, UEA, 23-46.
- (2007): “Automatische Morphemanalyse in Esperanto macht Komposita besser lesbar auf dem Bildschirm”. En: Detlev Blanke (red.): *Esperanto – wie aus einem Projekt eine Sprache wurde. Interlinguistische Informationen, Beiheft 14 (Beiträge 16. Jahrestagung Berlin 2006)*. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 51-58.
- (2007): “Konserveme renovigi? Jen la pruvo!” (recenzo pri PMEG). En: revuo *Esperanto*, n-ro 1203 (majo), 111-112.
- (2009): “ESPSOF – ambicia tekstreviziilo”. Programaro por literumkontrolo, morfemdisigo, kunmetaĵ-analizo, k.s.; http://www.iei.nl/nova%20teknologio_espe.htm kaj www.espsof.com, 8 p.
- (2009): “Afikskorpuso Versio 1” (entenas 11 afiksojn kaj baziĝas sur tekstkorpuso de 1.3 miliono da vortoj). En: <http://www.scribd.com> [tie entajpu 'afikskorpuso' sub 'Advanced Search'], 604 p.
- (2009): “Novjarmila teĥnologio: ĉu ĝi forpelos aŭ kreos analfabetecon?” (aperonta).

7 **Libro omaĝe al István Szerdahelyi**

Omaĝe al prof. István Szerdahelyi (1924-1987), kiu en 2009 fariĝintus 85-jara, lia disĉiplino, *d-rino habil. Ilona Koutny*, redaktis jenan rimarkinde riĉan libron:

Koutny, Ilona (2009, red.): Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al Prof. István Szerdahelyi. Red. Poznan: ProDruk & Steleto, ISBN 978-83-61607-32-8, 408 p.

Enhavo de la libro

Antaŭparolo (Ilona Koutny)

Prezento kaj rememoroj

GADOS Zuzsa	Mallonga biografio
VAHA, Blazio	Mi sentas min lia instruito
HORVÁTH Jozefo	Kristnasko de 1981 ĉe profesoro Szerdahelyi
ERTL István	La malpravo de profesoro Szerdahelyi
HUKAYA Sitosi	Aventuro de japana junuleto kun Tamiko kaj Prof. Szerdahelyi
PRUNKL Mária kaj János	Rememoro vorte kaj bilde
FARKAS Tatár Éva	“Ŝi estas pedagogo sendiploma”
ZAJDMAN, Jefim	Rememoro pri renkontiĝo en Moskvo
NANOVFSZKY György	Rememoro de diplomato
ROKICKI, Ryszard	Esperantologia testamento
DAHLENBURG, Till	Prof. Szerdahelyi – mia lasta renkontiĝo kun li
SILFER, Giorgio	La lingvistika redaktoro de Literatura Foiro
TÖTÖSNÉ Gados Zuzsa – Máthé Árpád	Speciala bibliografio de esperanto-agado de István Szerdahelyi

Lingvoplanado kaj lingvopolitiko

BARANDOVSKÁ-FRANK, Věra	Praesperanto – la planlingva Ossian
SAKAGUCHI, Alicja	Nekonata planlingvo el Pollando: Paraglot
SCHILLER Judit	Akcepto de Esperanto (kaj de la mondlingvo-problemo) en la hungara (lingvistika) gazetaro, ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo 19a/20a

- WACHA Balázs / VAHA, Blazio
Vortokategorioj en lingvopriskribo, en planlingvoj kaj lingvoprojektoj
- BLANKE, Detlev (Tro) malfrua vekiĝo? La germanoj kun sia lingvo en la Eŭropa Unio
- GADOS László Pri la ŝancoj de Esperanto en la mondo

De esperanta gramatiko al ĝenerala lingvistiko

- DASGUPTA, Probal Apud la vorteroj: la vortila kromvojo
- DUC GONINAZ, Michel Szerdahelyi kaj la “gramatika karaktero de la radikoj”
- ROKICKI, Ryszard Sintaksa genro de esperantaj radikoj
- BUJDOSÓ Iván Morfemkombinaĵoj en Esperanto
- SIMONNET, Francisko La skriberoj de Esperanto
- HORVÁTH Katalin Polisemio, sinonimio kaj esperanto
- PENNACCHIETTI, Fabrizio A.
La ‘cerbo’ de la ostoj kaj la ‘medolo’ de la kapo
- SALGA Attila Skizo de kontrasta Esperanta-Hungara gramatiko
- WASEDA Míka Esprimo de moviĝo en Esperanto, la hungara kaj japana lingvoj
- HAVAS Ferenc Metaproblemoj de lingvotipologio
- KUZNECOV, Sergej Babelo – turo inter civilizoj

Lingvopedagogio

- BARCSAY Zsuzsa Kultura fono de Esperanto en diversaj lernolibroj por junuloj kaj plenaĝuloj
- CORSETTI, Renato La lernofaciliga valoro de Esperanto: de Szerdahelyi al Springboard to languages
- KOVÁCS Márta Antaŭ kaj post la Komuna Eŭropa Referenckadro: lingvaj ekzamenoj pri Esperanto .
- KÓRÓDY Zsófia Instrui kvalite, kvalifikite
- KOVÁTS Katalin Moderna aliro al malnovaj ideoj kaj rezultoj
- GACOND, Claude Pri la personaj pronomoj. Metodikaj klarigoj
- HORVÁTH Jozefo (Budapesto)
Kio estas Pirata Metodo?

SALOMON Császár Pálma

Duboj kaj demandoj pri familia lingvouzo

Literaturo

TÓFALVY Éva

Aersoifo

SZABÓ Imre

Pensoj pri *Purakore* de Attila József

ERTL István

Pontoj inter la gentoj: Disaj pensoj pri Esperanto kaj tradukado

RÁTKAI Árpád

Frigyes Karinthy la esperantisto

Esperantaj leksikografio, movado kaj la cetero

HAUPENTHAL, Reinhard

Kio estas kaj kial ni bezonas Historian Vortaron de Esperanto (kun konkordanco de inkunablo 14: La Neĝa Blovado).

HORVATH, Jozefo (Győr)

Esperanta-Hungara Meza Vortaro elektronika (EHV)

RÉVÉSZ Sándor

Ĉiuj aliel samas

DUDICH Endre

De mistero al mis-Tero

FERENCZY Imre

Historio de la Internaciaj Medicinistaj E-Konferencoj. Hungaroj en la movado

MOLNÁR Lajos & FARKAS Julianna

Kvardek jaroj de la Budapeŝta Medicina Esperanto-Fakgrupo

HEGYI István

Provado per desegno-lingvo ĉe afazia knabo

KOUTNY Ilona

Esperanta leksikografio en la epoko de komputiloj

La ĉapitro pri LINGVOPEdagogio estas legebla en www.edukado.net

Same la diplomlaboraĵo de Zsuzsa Gados pri Szerdahelyi kaj de Marta Kovacs pri la kvinlanda eksperimento.

La voĉon de Szerdahelyi oni povas aŭskulti jam delonge en la ILEI-retpaĝo:

<http://www.ilei.info/hungario/sonmaterialoj.php>.

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. www.esperantio.org . ISSN 1385-2191. Redaktas: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.:+ 49-30-54 12 6 33, fakso:+ 49-30-54 98 16 38, detlev@blanke-info.de. Mendu nur ĉe UEA. Kontribuojn sendu nur al la redaktoro, per retpoŝto aŭ sur disketo/KD. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Bv. sendi pruv-ekzempleron. Estas bibliografiataj ĉefe viditaj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro. Kunlaborantoj el ĉiuj regionoj de la mondo bonvenas. Por fakuloj IpI estas senpage ricevebla ĉe C.O. de UEA.
